

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

8

1983



NOVA FIZIONOMIO DE ŜANHAJO

Fotoj de ZHAO TIANZUO, WANG ENPU kaj ZHU ZHONGHUA



Kontenera doko de la Ŝanhaja Haveno

Ŝanhajo, ĉe la bordo de la Orienta Ĉina Maro kaj en la orienta fino de la Jangzi-rivera Delto, estas la plej granda urbo de Ĉinio kaj ĝia grava akvo- kaj ter-trafficaj centro. La ŝarĝ- kaj malŝarĝ-kvanto de ĝia haveno pli-ol-40-oble pligrandiĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. La urbo havas prosperajn komercon, trafikon, sciencan kaj kulturan kaj estas bazo de malpeza, tekstila, petrol-kemia, pez-maŝina, aviadila, aŭta, ŝip-konstrua, elektrona kaj aliaj industrioj.

Kun la senĉesa pliboniĝo de la industria dispozicio, oni starigis kvin industriajn kvartalojn kaj sep satelitajn urbojn, el kiuj estas Jinshanwei. Por plibonigi la loĝkondiĉojn de la popolo, oni konstruas novajn loĝdomojn kun plank-areo de pli ol 8 000 000 kvadrataj metroj. La poŝta kaj telegrafa domo, la nova stacidomo, la animala eksperimenta centro de la Ŝanhaja Akademio de Sciencoj, la turisma domo kaj la domo por ekstera komerco (en kunlaboro kun eksterlandaj komercistoj) estas ekkonstruataj. La satelita urbo Jinshanwei kun la Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko kiel sia ĉefa parto jam malfermiĝis al turistoj. Oni ankaŭ riparos pitoreskejojn kaj antikvajn vidindejojn por riĉigi la kulturen vivon de la popolo.



La Shiliupu-a Pasaĝera Doko de Ŝanhajo



**La Ĝenerala Petrol-kemia
Fabriko de Ŝanhajo en
konstruado**

**Laborejo de la Orlo-
na Fabriko de la Ĝe-
nerala Petrol-kemia
Fabriko**

**Nove konstruita por
to kun spango de 22
metroj ĉe Maogan**



Laborista loĝkvartalo en la
satelita urbo Jinshanwei



Nova komerca kvartalo en Jinshanwei

Novaj loĝdomoj



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Violonisto Wang Xiaodong, kiu gajnis la unuan lokon de geknaba grupo en la Unua Internacia Violona Konkurso de Menuhin okazigita en Folkestone, Britio, en aprilo ĉi-jare.

Foto de REN SHIYIN

SUR LA DORSKOVRILO:

Ceramikaj Dancista kaj Muzikistaj Figuroj

Foto de REN SHIYIN

La surkamelaj figuroj faritaj laŭ la tekniko de la trikolora ceramikaĵo de Tang-dinastio, vivece prezentas aktivadon de dancistinoj kaj muzikistoj en Tang-dinastio.

KOLORAJ SERIOJ:

Nova Fizionomio de Sanhajo
Pejzaĝoj de Wuyang-rivero
Fotografitaj de esp-isto
Kortegaj dancoj kaj muziko de Tang-dinastio

Antikva Ceramiko de Ĉinio

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Vigla Jangzi-rivera trafiko
Antaŭ Tian'anmen-pordego

Enhavo

Satelita urbo ĉe senhoma marbordo	2
La ĉina agrikultura meĥanizado en reformado	6
Pri la naturo de Esperanto	9
POR KOMENCANTOJ: Kvar semeroj de kukurbo	22
SUR NIA LIBROBRETO: Aŝma	13
ESP-NOVAĴOJ	15
Ĉiam antaŭeniranta homo	17
Meteorologia inĝenierino el Xishuangbanna	20
MIA VIVO: Kiam bestoj estas malsanaj	26
Ili propramane bonigis sian lernomedion	28
20 sanprotektaj ekzercoj (1)	30
Tri malgrandaj violonistoj	34
Kortegaj dancoj kaj muziko de Tang-dinastio sur la hodiaŭa scenejo	46
Knabino vendanta ventumilojn	36
VIDINDAJ LOKOJ: Pitoreska Wuyang-rivero	23
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Plej-oj de la mondo en Ĉinio	39
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Sciencaj kaj kulturaj atingoj de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj	42
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikva ceramiko de Ĉinio	44
Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de J. Hašek	40
KURANTAJ AFEROJ	33
KORESPONDI DEZIRAS	14

JARABONTARIFO	Belgio	BF 180.00	Finnlando	FMK 24.00	Italio	Lit 5200	Nederlando	Gld. 12.60	Portugalio	Esc. 400	
Aŭstralio	\$A 5.70	FR Germanio	DM 10.80	Francio	FF 26.00	Japanio	Yen 1400	Nov-Zelando	NZ\$ 6.70	Usono	US\$ 6.00
Aŭstrio	Sch 80.00	Britio	£ 3.00	Hispanio	Pts 600	Jugoslavio	Din. 180	Svisio	SF 10.00	Kanado	Can\$ 7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

SATELITA URBO ĈE SENHOMA MARBORDO

KIAM ni venas de la movoplena urbego Ŝanhajo al ĝia satelita urbo Jinshanwei, nin tuj impresis ĝiaj freŝa aero kaj kvieta medio, kvankam tie dense staras olerafinaj turoj kaj olecisterno kaj interkruciĝas dikaj kaj maldikaj oletuboj. Jinshanwei estas la plej juna el la 7 industriaj satelitaj urboj de Ŝanhajo. Ĝi disvolviĝas kun la konstruado de la Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko de Ŝanhajo. Ĝi havas historion nur de 11 jaroj, tamen en multaj flankoj jam montris siajn avantaĝojn kaj allogas al si ĉiam pli multajn lo-

ĝantojn el Ŝanhajo por tie labori kaj fiksloĝi.

MODERNA FABRIKO

Jinshanwei sin trovas 75 kilometrojn sudokcidente de Ŝanhajo. Norde ĝi tuŝas la riĉan ebenaĵon Hangjiahu kaj sude rigardas al Hangzhou-golfo. En 1972 la ĉina registaro decidis konstrui tie petrol-kemian industrian kombinaton pro la tieaj facila trafiko tera kaj mara kaj aliaj favoraj kondiĉoj.

En vintro de tiu jaro 50 000 laboruloj venis tien. Ili en 32


tagoj konstruis mardigon longan je 8.5 kilometroj kaj per tio kreis teron de 700 hektaroj. En la Novjara Tago la konstruantoj metis la unuan bazfoston kaj de tiam rapide progresis la konstruado. En 1976 aperis ses porproduktaj fabrikoj, kvar helpaj fabrikoj, kajo por ankri du 25 000-tonelajn oleŝipojn, fervoja kaj ŝosea ponto kaj speciala fervojo kondukanta al Ŝanhajo. En januaro de 1979 la Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko de Ŝanhajo jam komencis sian produktadon, konforme al kio aperis ankaŭ loĝkvartaloj.

Konstruantoj de Jinshanwei faras termezuradon.



La moderna kombinato havas 18 kompletojn da produktaj ekipaĵoj, el kiuj duono estas importita el Japanio kaj FR Germanio kaj la alia duono estas produktita de Ĉinio mem. Ankaŭ la lasta jam atingis teknologian nivelon de la importitaj ekipaĵoj. En multaj laborejoj la manipulantoj en kontrolejoj povas informiĝi pri la produkta procedo per diversaj aparatoj kaj ciferoj kaj bildoj montritaj sur la ekranoj.

Post kiam la entrepreno malfermiĝis al produktado, ĝiaj ekipaĵoj tre baldaŭ atingis aŭ superis la projektitajn normojn. Per petrolo el Daqing kiel materialo ĝi ĉiujare produktas 102 000 tunojn da diversspecaj sintezaj fi-



La Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko de Sanhajo en Jinshanwei

broj kaj 60 000 tunojn da plasta rezino.

Nun streĉe iras la duperioda konstruado kun pli alta utiligo de nafto kiel ĉefa celo. La importitaj 7 kompletoj da ekipaĵoj estos muntitaj antaŭ la fino de la kuranta jaro kaj povos prove funkcii en la venonta jaro. Post la funkcio de la ekipaĵoj de la duperioda konstruado ĝi ĉiujare pliprodukta 180 000 tunojn da sintezaj fibroj kondiĉe je 60-pocenta plimultiĝo de la uzata nafto ĉiujare.

MEDIOPROTEKTADO ESTAS ATENTATA

La ĝenerala fabriko ĉiujare forkonsumas 1.8 milionojn da tunoj da nafto kaj ĉiutage 42 000 tunojn da akvo. Traktado de la gaso kaj akvo elvomitaj dum la produktado rilatas rekte kun la prospereco de tiu satelita urbo.

Dum la ĝenerala projektado oni jam donis al tio sufiĉan atenton.

La urbo okupas totalan areon de 973 hektaroj. Ĝi 9.6 kilometrojn longa de oriento al okcidento kuŝas ĉe la marbordo kvazaŭ granda fiŝo. Post esplorado de la vento-direkto en la pasintaj jaroj la projektantoj aranĝis la loĝkvartalojn en la sudorienta parto de la urbo, la plej bona loko en la devena kaj paralela direkto de ventoj, kaj lokis la fabrikojn en la meza kaj okcidenta partoj. La fabrikoj, kiuj ellasas relative multajn gason kaj akvon, devas esti minimume 2 kilometrojn for de la loĝkvartaloj. Inter la loĝkvartaloj kaj fabrikoj etendiĝas forstozono 300 metrojn larĝa kaj 1.5 kilometrojn longa. Nun la plantitaj arboj jam plenkreskis en ombroriĉan arbaron, kie gaje kantas birdoj kaj ĉie videblas muska tapiŝo. Laŭ la projekto la profesia verdiga taĉ-

mento verdigos la kvartalojn loĝajn kaj produktajn. Nun oni jam plantis en la urbo 850 000 diversspecajn arbojn, kreis gazonojn kun areo de 27 000 kvadrataj metroj, tiel ke por ĉiu urbano meznombro estas publika gazono de 5 kvadrataj metroj, 9-oble plimulte ol tiu en Sanhajo. La arbaro kaj gazonoj ne nur beligas la medion, sed ankaŭ certigas eternan freŝecon de la urba aero.

La Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko ellaboris rigoran regularon pri traktado de la polucia akvo ellasita dum la produktado kaj vivado. La polucia akvo ellasita de la fabrikoj nepre devas esti traktata unue en ĝiaj filiaj fabrikoj, kaj kiam ĝi atingis la difinitan normon, oni kondukas ĝin al la traktejo por plua traktado. La traktejo sin trovas en la okcidenta fino de la fabrik-tereno. Ĝi kun areo de 33.4 hektaroj ĉiutage povas trakti ĉirkaŭ 60 000 tunojn



Parto de la loĝkvartalo en Jinshanwei

da polucia akvo. Post semajna biologia traktado la akvo estas permesita ellasiĝi en Hangzhou-golfon, kiam ĝia kvalito atingis la normon difinitan de la ŝtato.

La Mediokontrola Administracio de Ŝanhajo ĉiujare sendis al Jinshanwei por mezuri la entenan procenton de la ellasita gaso en la aero. La ricevataj donitaĵoj ĉiam estas sub la ŝtata normo. En 5 sinsekvaj jaroj ĝi faris mezuradon al la traktita akvo ellasita de la traktejo en Hangzhou-golfon kaj konstatis ke la golfo ne estas malpurigita. Pro tio la traktejo estas honorita kiel avangarda unuo pri medioprotektado en Ŝanhajo en sinsekvaj jaroj.

BONAJ INSTALAJĜOJ POR ĈIUTAGA VIVO

Laŭ la projekto oni konstruos 16 loĝkvartalojn en la sudorienta parto de la urbo kun loĝdomoj por laboristoj kaj oficistoj kaj publikaj konstruaĵoj. La plankareo de tiuj konstruaĵoj atingos ĉ. 1.2 milionojn da kvadrataj metroj, inter kiuj la loĝdomoj

okupas 700 000 kvadratajn metrojn. Tiun planon oni komencis plenumi samtempe kun la konstruado de la fabriko.

Nun oni jam finkonstruis 12 loĝkvartalojn. La helflavaj, palruĝaj, helverdaj kaj helbluaj domoj 5-6-etaĝaj kun belaj formoj impresas agrable. La loĝkondiĉoj en Jinshanwei estas pli bonaj ol tiuj en Ŝanhajo. La apartamentoj de loĝdomoj konsistas el unu, du aŭ tri ĉambroj kaj estas kompletigitaj per balkono, kuirrejo kaj tualetejo, kaj ekipitaj per gasa kaj radiatora servoj. Ĉiu loĝanto meznombro okupas 6.8 kvadratajn metrojn da loĝareo, pli granda ol tiu en la urbo Ŝanhajo, tamen la lupago estas malpli kara.

Oni povas diri, ke Jinshanwei havas ĉiujn instalaĵojn necesajn por urba vivo. La aranĝo de komercaj servoj, edukaj, higienaj instalaĵoj estas racia kaj oportuna al la vivo de la loĝantoj.

Tie fondiĝis infanĝardenoj, kiuj akceptas pli ol 2 000 infanojn, kaj elementaj, mezgradaj, teknikaj, mezgrade fakaj kaj

postlaboraj lernejoj, kie studas pli ol 7 700 lernantoj.

Ambaŭflanke de la centra strato en loĝkvartaloj servas magazenoj, manĝajvendejoj, restoracioj, poŝtoŝtanco, banko, librovendejo k.a. Diversaj butikoj dislokiĝas en loĝantaraj punktoj.

Proksime al la forstozono funkcias hospitalo kun 22 fakoj kaj 510 malsanulaj litoj. En tempo daŭro de du kaj duona jaroj ĝi faris plenampleksan korpan ekzamenon al la pli ol 30 000 laboristoj kaj oficistoj kaj la dua ekzameno baldaŭ komenciĝos.

Kinejo, kultura domo de laboristoj, stadiono kaj naĝejo jam malfermiĝis al uzado. En la dua konstrua periodo oni konstruos bibliotekon, sciencan halon, geknaban domon kaj marbordan parkon kun areo de sep hektaroj.

Por havigi laborojn al familianoj de laboristoj kaj oficistoj kaj kamparanoj, kies agro estis rekviziita de la ŝtato pro la konstruado, oni funkciigis sep fabrikojn de kolektiva posedanteco. Nun ĉiuj laborkapablaj urbanoj ricevis laboron kaj eĉ malmultaj

handikapitoj havas sian laborejon kie ili sin okupas pri malpezaj laboroj.

LOGANTOJ DE LA SATELITA URBO

Nun la urbo havas pli ol 68 000 loĝantojn plejparte el Ŝanhajo, parte estis ĉirkaŭaj kamparanoj, kies tero estis rekviziita, kaj parte el konstruantoj de aliaj provincoj kaj urboj. Du trionoj de ili jam fiksloĝiĝis tie. Sufiĉe granda parto de la laboristoj kaj oficistoj loĝas en kolektivaj loĝejoj kaj revenas hejmen en ferioj al Ŝanhajo por kunesti kun siaj familianoj. Ilia veturado estas pagata de la fabriko.

En la plej norda fino de la satelita urbo konstruiĝis nova vilaĝo por 600 kamparanaj familioj, kies kampoj estis rekviziciitaj. La registaro havigis al ili laborojn kaj bone aranĝis ilian vivon. 46-jara Qian Xingming havis antaŭe duetaĝan dometon. Ĝi estis malkonstruita dum la agra rekvizicio. La registaro pagis al li por tio 7 500 juanojn kaj luigis al li du apartamentojn ĉiu kun du ĉambroj por lia kvinmembra familio. Ĉiumonate ili lupagas nur 9.06 juanojn. Escepte de lia maljuna patro, li kaj liaj edzino kaj gefiloj ĉiuj havas laboron kun totala monata enspezo de pli ol 200 juanoj. Ili vivas feliĉe.

La tieaj loĝantoj, kiuj venis el Ŝanhajo, komence ne kutimiĝis al la nova medio. Sed iom post iom ili starigis inter si novajn sociajn rilatojn.

42-jara Fang Zhaorong kaj lia edzino laboras en la Dua Ke-miindustria Fabriko. Ili transloĝiĝis tien kun siaj emerita patrino kaj filo en 1979. Ili loĝas kune kun aliaj kvar familioj sur unu sama etaĝo en la kvara vila-

ĝo. La kvin familioj laboras respektive en ok fabrikoj kaj nur la patrino de Fang restas hejme tage. Ŝi ĉiam havas varman koron por siaj najbaroj, reprenas por ili sunumatajn vestojn, kiam pluvas, zorgas iliajn infanojn por ke ili faru hejmajn taskojn en ŝia hejmo kaj atentigas ilin ne laŭte krii kiam iu devas dormi tage por nokta deĵoro.

La najbaroj tre fidas Fang, lian patrinon kaj la tutan familion. En iu Printempa Festo venis al Fang multaj parencoj. Tiam lia najbaro majstro Yao kun siaj familianoj volis reveni al Ŝanhajo por pasigi la feston. Yao do konfidis sian ŝlosilon al avino Fang por ke ŝiaj gastoj tranoktu en lia hejmo. Foje avino Fang subite eksuferis kordoloron. Ŝiaj najbaroj venigis al ŝi ambulanccon kaj telefone informis tion al

hospitalo. En 17 tagoj, kiam avino Fang restadis en la hospitalo, ĉiutage vizitis ŝin ŝiaj najbaroj portante al ŝi fruktojn kaj kukojn.

Nun la fabriko, kie laboras Fang Zhaorong, volas disponigi al li novan apartamenton kun relative bonaj kondiĉoj, sed li ne akceptis, ĉar li ne volas forlasi siajn bonajn najbarojn.



En infanĝardeno de Jinshanwei

LA ĈINA AGRI- KULTURA MEĤANIZADO EN REFORMADO

LA industrio de agrikulturaj maŝinoj kaj la agrikultura meĥanizado de Ĉinio jam trapasis pli ol 20 jarojn dum sia disvolviĝo.

Nun la ĉina kamparo havas 800 000 traktorojn grandajn kaj

mezgrandajn, 2.2 milionojn da mantraktoroj, 4 milionojn da agrikulturiloj tirataj per maŝinoj kaj 6 milionojn da maŝinoj por dreno kaj irigacio. La movfortoj de la agrikulturaj maŝinoj jam atingis 220 milionojn da ĉevalpovoj. En la tuta lando la maŝin-

Falĉado



plugita areo konsistigas 22.4% de la totala areo de la agroj kaj 11% de la semado estas plenumataj per maŝinoj. La areo de kampoj irigaciataj per elektraj pumpiloj atingis 25 milionojn da hektaroj, kiuj konsistigas 56.6% de la efika irigaciata areo.

LA LECIONOJ

La industrio de agrikulturaj maŝinoj de Ĉinio ludis aktivan rolon en plibonigo de la kondiĉoj de ĝia agrikultura produktado, en efika batalado kontraŭ naturaj katastrofoj kaj en garantio de la disvolvado de agrikulturo, kaj samtempe metis materian kaj teknikan bazon por transformi la ĉinan agrikulturon de la memsufiĉa kaj duonmemsufiĉa ekonomio en tiun de la komerca ekonomio kaj la tradician agrikulturon en la modernan. Sed la ĉina agrikultura meĥanizado iam iris zigzagan vojon dum sia disvolviĝado. Jen estas la ĉefaj lecionoj:

La blindeco en produktado kaj disvastigado de agrikulturaj maŝinoj kaŭzis malracian dispozicion de la industrion de agrikulturaj maŝinoj, ripetadon en konstruado de fabrikoj, multajn tipojn de maŝinoj, malaltan kvaliton de la produktaĵoj kaj malbonan ekonomian efikon.


La kapitalo por aĉeti agrikulturajn maŝinojn dependis nur de la investado kaj monpruntado de la ŝtato en konsiderinde longa periodo.

La ununura formo de ŝtata entreprenado de agrikulturaj maŝinoj malhelpis la aktivecon de kamparanoj en tiu afero.

REGULIGO

En la komenco de 1979 Ĉinio resumis la sperton kaj lecionojn de la pasintaj pli ol 20 jaroj kaj

Gubernia
kokobredejo



faris reguligon al la industrio de agrikulturaj maŝinoj laŭ sia realeco:

1. En la ĉina kamparo multas laborfortoj, la terkultura sistemo estas komplika kaj la kolektiva ekonomio malforta. Tial, dum la estonta sufiĉe longa tempo Ĉinio devas disvolvi produktadon de agrikulturaj maŝinoj kaj samtempe ankaŭ simplaj iloj por manlaboro; utiligi samtempe homfortojn, brutfortojn kaj elektrajn movfortojn; kombini la maŝinan metodon kaj biologan teknikan metodon.

Laŭ tiu gvidpenso, oni reduktis la nombron de la nenecesaj samspecaj agrikulturilaj fabrikoj kaj pliigis la nombron de la agrikulturaj maŝinoj konformaj al la agrikultura produktado. Nun la nombro de la traktoraj fabrikoj malpliigis de 208 en 1979 al 120, kaj tiu de la dizel-fabrikoj de 277 al 140, dum la nombro de fabrikoj de brutobredadaj maŝinoj kreskis de 12 al 20. Oni nun klopodas, por ke la produktaĵoj

estu malgrandaj, bonkvalitaj, malkaraj, energioŝparaj kaj taŭgaj por pluraj uzoj. Kaj krome plimultiĝis novaj produktaĵoj, kiel ekzemple, maŝinoj por ŝpruca irigacio, sternado de plastmembrano, profundigo de kemisterko kaj preciza maizsemado.

2. Ĉinio havas vastan teritorion, kaj la diferencoj inter diversaj regionoj estas grandaj. Tial, la agrikultura meĥanizado devas esti efektivigita laŭ la lokaj konkretaj kondiĉoj. Ekzemple, la Nordoriento, la Interna Mongolio kaj Xinjiang kun relative malmultaj loĝantoj havas tamen vastan kultureblan teron kaj samtempe posedas multajn agrikulturajn maŝinojn, tial en tiuj lokoj la agrikultura meĥanizado povas esti pli frue efektivigita. Ĝi povas esti efektivigita pli frue ankaŭ en iuj internaj kaj marbordaj regionoj de Ĉinio, kie la ekonomiaj kondiĉoj estas pli favoraj, industrio kaj flankokupoj disvolviĝas rapide kaj la proble-

mo de superflujaj laborfortoj povas trovi sian solvon.

Por laŭplane efektivigi la agrikulturan meĥanizadon, la ĉina registaro dividis la tutan landon en 9 regionojn, kiuj estas la nordorienta agrikultura kaj arbara regiono, la nordĉinia agrikultura regiono, la sudorienta agrikultura regiono, la sudokcidenta agrikultura kaj arbara regiono, la agrikultura regiono sur la Leŭsa Altebenajo, la nordokcidenta agrikultura kaj brutobreda regiono, la brutobreda kaj agrikultura regiono en norda Xinjiang, la brutobreda regiono sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo kaj la marproduktaja regiono, kaj samtempe ĝi komencis ellabori projektojn de la agrikultura meĥanizado por malsamaj lokoj.

3. Anstataŭ ununura kolektiva entreprenado de agrikulturaj maŝinoj oni disvolvas samtempe diversformajn entreprenadojn. La bazaj agrikulturilaj stacioj ŝanĝis sian administradon en servon al agrikulturo, forstumado,

brutobredado, flankokupo kaj fiŝado; kaj samtempe ili ankaŭ helpas kamparanojn, kiuj havas agrikulturajn maŝinojn, en tekniko. La kolektivaj stacioj de agrikulturaj maŝinoj starigas kontraktojn kun kamparanoj en formo de interkonsento. Oni ankaŭ fondis servajn establadojn kiaj plantprotekta kompanio, irigacia kompanio kaj aliaj.

ATINGOJ

Kvankam Ĉinio faris nur unuapaŝan reguligon al la industrio de agrikulturaj maŝinoj kaj la agrikultura meĥanizado, tamen ĝi jam akiris ĝojindajn sukcesojn.

Unue, la dispozicio de la industrio de agrikulturaj maŝinoj kaj strukturo de la produktaĵoj fariĝas iom post iom racia, kaj la produktado estas organizata laŭ la postulo de la kamparo. La produktado de malgrandaj agrikulturaj maŝinoj rapide kreskis. La

nombro de mantraktoroj pliiĝis je 30% ol tiu en 1981, kaj ilia vendokvanto je 43%. Multe disvolviĝis la produktado de maŝinoj por dreno kaj irigacio, brutobredado, prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kaj ankaŭ tiu de maŝinpartoj kaj duonmeĥanikaj agrikulturiloj.



Due, la agrikultura meĥanizado estas solide plenumata en ĉiuj lokoj laŭ iliaj kondiĉoj. Post praktikado de la produkta respondeco-sistemo en la vasta kamparo de Ĉinio, la agrikultura produktado disvolviĝis kaj la kamparanoj riĉiĝis, tio multe levigis ilian aktivecon aĉeti agrikulturilojn. Ni prenu mantraktorojn kiel ekzemplon. En 1982 en Henan-provinco la nombro de venditaj maŝinoj plimultiĝis je 30 000 kaj en la provincoj Jiangsu kaj Guangdong je 20 000 respektive. En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio la

nombro plimultiĝis je 6 000 en unu jaro, 3-oble de tiuj en 1981. En Heilongjiang-provinco, la nombro de grandaj kaj mezgrandaj traktoroj plimultiĝis je ĉ. 26 000 en la pasintaj tri jaroj, kiuj preskaŭ estas duono de tiuj en la pasintaj 26 jaroj.

Krome, la servado al la agrikulturaj maŝinoj disvastiĝis iom post iom. En Zhejiang-provinco troviĝas ĉ. 1 000 komunumaj agrikulturilaj servostacioj kaj pli ol 3 000 brigadaj servotaĉmentoj. En 1981 la Plantprotekta Kompanio en Yixinjie-komunumo de Jiangsu-provinco kontrakte prenis sur sin la tutan laboron de prevento kaj kuraco de plantmalsanoj kaj eliminado de fiinsektoj por 123 hektaroj da rizkampoj kaj ricevis bonan efikon. En 1982 ĝi faris kontrakton pri tia laboro por 686 hektaroj da rizkampoj, kiuj konsistigas 95% de la totala areo de la rizkampoj en la komunumo.

Nun la ĉina agrikultura meĥanizado disvolviĝas firmaŝe. Estas certe, ke en neralproksima estonteco aperos nova situacio en la ĉina agrikultura meĥanizado.

Irigiada



WILLIAM AULD*:

PRI LA NATURO DE ESPERAN- TO



La aŭtoro

ESPERANTO estas lingvo unika. Interalie ĝi estas la sola vivanta lingvo en la mondo, kiu estas sennacia, t.e. kiu ne havas nacian aŭ geografie limigitan socian bazon. Ĝi havas indiĝenajn parolantojn, la tiel nomatajn denaskajn esperantistojn. Tiuj estas homoj denaske dulingvaj, kiuj nature akiris samtempe Esperanton kaj minimume unu nacian lingvon. Oni ekde Zamenhof ĉiam opiniis, ke tiaj denaskaj esperantistoj estus gravega akiraĵo por la lingvo, ĉar nur tiel Esperanto pruvigus lingvo "natura" kaj tiaj esperantistoj nature komprenus la karakteron de la lingvo kaj ekspluatus ĝin senkonscie kaj senarte. Observante la lingvaĵon de tiaj denas-

kuloj, la esperantistoj ĝenerale ricevas praktikan komprenon pri la lingvo liberigita de ĉiuj antaŭjuĝoj devenintaj de la pli frua kaj do pli forta influo de iu nacia lingvo. Dum multaj jaroj aperis la revuo "Gepatra Bulteno", kiu celis registri la rezultojn de tiaj eksperimentoj.

Sendube tiaj eksperimentoj estas samtempe utilaj kaj treege interesaj. Sed ili enhavas unu gravan konceptan eraron. Nome, eĉ por tiuj denaskaj esperantistoj Esperanto devas en tre frua stadio fariĝi lingvo dua kaj multriplate duagrada. Mi neniel kaj neniam malkonsentas pri la graveco de tia dulingveco. Male, mi konsentas, ke tiuj gepatroj, kiuj

persistas pri tiu hejma dulingveco, gravege kontribuas al nia afero. Sed praktike — dum la pliparto de la jaro — la nacia lingvo ekster la hejma medio estas la lingvo uzata kaj uzebla; kaj kiam komenciĝas la formala edukado de la infano, Esperanto ne havas rolon en tio — aŭ maksimume, pro hejma edukado en kaj pri Esperanto — havas rolon apartan kaj kvante limigitan.

Sekve, el vidpunkto de lingva kulturo la nacia lingvo superombas la internacian en la menso de la infano kaj eventuale (kvankam tio tute ne estas pruvita) influas ties uzadon. En multaj okazoj la denaska esperantisto neniam implikiĝas en la movadon, kaj ofte, pro manko de

praktikado, pli-malpli forgesas la lingvon. La denaska posedado de iu ajn lingvo neniam garantias per si mem pli ol minimuman lingvan kompetentecon de la posedanto (kontrolo mem en la naciaj lernejoj!).

Kion ni fakte bezonas — ni, kiuj lingvistike esploras la naturon, karakteron kaj dinamicon de Esperanto — estas ĝuste tio, kion ni certe neniam ricevos, t.e. denaska esperantista unulingvulo! Ni bezonas iun aparte inteligentan infanon, kiu ĝis la aĝo de, ni diru, 11 jaroj neniam aŭdas iun ajn lingvon krom Esperanto, loĝas en societo kies sola lingvo estas Esperanto, kaj kies frua edukiĝo estas normala ĉiurilate sed okazas nur pere de Esperanto! Evidente, fantaziaĵo. Nur multmilionulo, kiel en la fruaj ĉapitroj de la romano “Hura!” de Baghy, povus aranĝi por si tian eksperimenton — sed mi supozas, ke la rezultoj de tiu eksperimento montriĝus same katastrofaj, kiel en la analoga eksperimento en “Hura”. En niaj lingvaj esploroj ni devas do dependi de tiuj materialoj, kiujn ni reale havas.

La ordinaraj uzantoj de Esperanto malmulte bezonas lingvajn teoriojn, same kiel la ordinaraj uzantoj de naciaj lingvoj malmulte interesiĝas pri lingvaj esploroj. Tamen en la kazo de Esperanto oni povas eble ilin pravigi, pro la speciala situacio de tiu lingvo: nome, kvankam jam preskaŭ centjara, ĝi estas tamen ankoraŭ juna kaj rapide trairanta evoluon, kiun la naciaj lingvoj pli malrapide trairis jam delonge; ĝiaj uzantoj loĝas maldense disigitaj sur la tuta terglobo (kaj tial la socia ekvilibro estas malpli firma); kaj ĝia praktikado — malgraŭ fiera menciado pri diversaj fakvortaroj — estas ankoraŭ relative limigita. Tial

oni rajtas plu demandi: kia lingvo vere estas Esperanto?

Ne havante niajn denaskajn unulingvulojn, ni multe dependas de niaj personaj spertoj kaj niaj personaj scioj. Kun la pasado de la tempo ni dum la lastaj jaroj komencis ricevadi la unuajn studojn, kiuj komparas Esperanton kun lingvoj neeŭropaj, kiel ekzemple la ĉina kaj la zulua; kaj pro tiuj studoj, kaj pro la demandoj starigitaj de neeŭropanoj, ni frontas al tre grava kaj serioza demando, kies respondo kapablos multe influi, iom post iom, la lingvajon de la ordinaraj esperantistoj tra la mondo. Nome, ĝis kioma grado Esperanto fakte similas la lingvojn hindeŭropajn, kaj kiom ĝi similas laŭ sia naturo aliajn, ne hindeŭropajn, lingvojn?

Verŝajne tiun demandon neniam starigis al si la esperantistoj dum granda parto de nia historio. Esperanto naskiĝis en epoko, kiam la politika, teknika kaj ekonomia potenco en la mondo estis apartenajo plejparte de Eŭropo, kaj tial ŝajnis evidente al tiuj, kiuj fariĝis la fruaj esperantistoj, ke la lingvoj de la “plej civilizitaj” popoloj kaj la “plej evoluintaj” landoj nepre devis esti la lingvoj “plej civilizitaj” kaj “plej evoluintaj”, do komunikiloj superaj al la ceteraj lingvoj (kiujn en koloniaj landoj oni eĉ ne dignigis per la vorto “lingvo”, sed nomis ilin nuraj “dialektoj”). El tiu supozo sekvis, ke planlingvo nepre konformiĝu al la kriterioj de tiuj superaj lingvoj, kaj al neniu venis en la kapon tion repensi. Tial la fruaj esperantistoj rigardadis Esperanton tra lupeo nepre hindeŭropa.

Flanke menciindas, ke la kazo de Zamenhof mem inter la planlingvistoj estis almenaŭ durilate

speciala: (1) inter la lingvoj, kiujn li konis, troviĝis minimume unu, kiu ne estas hindeŭropa, nome la hebrea, kaj tiun lingvon li pro gentaj motivoj aparte amis; (2) la konstrukriterioj de Zamenhof ne estis ekskluzive, aŭ eĉ ĉefe, lingvistikaj: li frontis la praktikan celon ĉiel faciligi sian lingvon kaj ebligi ĝian tujan senperan aplikadon. El tiu lasta rezultigis, ekzemple, la multnombraj afiksoj, kaj la kodigo, kiun li uzadis en la Unua Libro, laŭ kiu *ĉiu elemento en la lingvo havas unu fiksitajn signifon, kiu neniam ŝanĝiĝas, kaj la signifo de vorto estas la sumo de la signifoj de ĝiaj elementoj*. Tiu fakto, esenca kaj gravega karakterizo de Esperanto, jam per si mem diferencigas la lingvon disde ĉiuj lingvoj hindeŭropaj! Kaj nur lastatempe ni estas informitaj, ke ĝi proksimigas Esperanton al ekzemple la ĉina.

Sed tion ne kapablis konstati la eŭropanoj, el kiuj konsistis preskaŭ ekskluzive la frua esperantistaro. La eŭropaj lingvoj influis diversmaniere Esperanton, kaj ekde la komenco ĝis la Ido-skismo, kaj ĝis hodiaŭ, ĉiuj reformpostuloj kaj reformprojektoj havis kiel solan celon la deziron *plisimiligi Esperanton al la lingvoj eŭropaj***. Dume la mondpotenco iom post iom kaj pli kaj pli forglitis de Eŭropo al aliaj mondpartoj, kaj tiu tendenco akceliĝas en nia epoko. La fakto, ke Esperanto relative sukcese rezistis la tendencon plieŭropigi ĝin, estas ĝia grava rekomendo kiel la sola planlingvo taŭga por uzado tutmonda.

Malgraŭ tio, la eŭropa pensmaniero influis grave kaj diversmaniere la disvolvon de la lingvo. Ekzemple, sian vortaran materialon Zamenhof difinis, ne per Esperanto mem, sed per tra-

dukoj en diversajn eŭropajn lingvojn. La fruaj vortaroj estis Esperanto-rusa, Esperanto-germana, Esperanto-franca, Esperanto-angla, k.s. Efektive, la unua tutesperanta vortarego estis tiu de Kabe, kiu ne aperis ĝis 1910. Tiu fakto — kiun mi tute ne riproĉas, ĉar kvankam *teorie* ĝi ŝajnas eble nebona, tamen *praktike* (kaj Zamenhof estis antaŭ ĉio praktika) ĝi estis neevitebla — havis plurajn gravajn rezultojn. Antaŭ ĉio ĝi naskis la koncepton, ke la esperantaj radikoj jam enhavas en si karakteron gramatikan: ke *frukt* estas substantiva, ekzemple, ke *blu* estas adjektiva; ke *parol* estas verba, ktp. Tiu koncepto ŝajnas tute natura se oni taksas Esperanton samspeca kiel la ceteraj lingvoj, ĉefe la hindeŭropaj. Kaj tamen tiu vidpunkto rezultigas, ke la finaĵoj en *frukto*, *blua* kaj *paroli*, ekzemple, estas superfluaĵoj el semantika (t.e. signifa) vidpunkto: *frukt* kaj *frukto*, *blu* kaj *blua*, eĉ *parol* kaj *paroli*, estas precize

samsignifaj. Tio ŝajnas kontraŭdiri la strukturigon prezentitan en la Unua Libro, kie ni trovas la frazon: Mi ne sci, as, kie mi las, is la baston, o, n; ĉu vi ĝi, n ne vid, is?, en kiu la diversaj elementoj de la lingvo estas apartigitaj de streketo kaj ĉiu elemento estas aparte klarigita en la vortaro. Sed la klarigoj, kompreneble, estas nacilingvaj, kio rekondukas nin ĝis la komenciĝo. Grava konstato tamen estas, ke ne nur *teorie* sed ankaŭ *praktike* tre multaj esperantistoj vidas kompletan paralelon en la serioj:

frukto	frukta	frukti
bluo	blua	blui
parolo	parola	paroli, ktp,

kaj ne sentas, ke unu el la formoj ĉiukaze havas ian precedencon. En la Proverbaro ni trovas verbojn uzitajn adjektive (kura/tima) kaj substantive (dono/akiro), substantivojn uzitajn verbe (pacienca/malpacos) kaj adjektive (paca/mizera), kaj adjektivojn uzitajn verbe (utilas/

avaris) kaj substantive (bono/kalvo). Supozeble ĉiu radiko estas uzebla en ĉiu gramatika rolo, kaj la signifo de la vortoj estas la sumo de ties elementoj.

La graveco de la t.n. gramatika karaktero de la radikoj troviĝas en tio, ke ĝi estas la bazo de la plej larĝe akceptita teoria klarigo pri la vortfarado en Esperanto. Ĝi klarigas kiel oni rajtas diri *bluokula* sed ne *bluokuloj*, ktp, ktp. Cetere, ankaŭ *bluokuloj* kompreneble havas signifon, sed tiu signifo ne egalas al “bluaj okuloj”. Kiam la poeto Miĥalski uzis la vorton *nov-amboso*, tio ne estis *nova amboso*, sed *amboso de la novo*. Tiu teorio estas tre praktike aplikebla kaj tial oni volonte akceptas ĝin. Sed ĝi starigas tiun etan malfacilaĵon, ke oni devas koni la gramatikan karakteron de ĉiu radiko — kaj ne ĉiam ĝi estas memevidenta, eĉ surbaze de nacilingvaj ekvivalentoj.

(Daŭrigo sur p. 38)

ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA

FARIĜU ANO DE ORE

ABONU “LA MEVO”-N

Ornitologoj, samfakuloj kaj amatoroj ŝirnu sin al landa delegito (kies adreso troviĝas en “La Mevo”) aŭ skribu (el okcidentaj landoj kie ne ekzistas delegito aŭ peranto) al s-ano J.G. Kuster, Paulinastraat 28, NL-7355 JW Hengelo, Nederlando, aŭ skribu (el socialismaj landoj kie ne ekzistas delegito) al la sekretario aŭ responda redaktoro de ORE, Debrecen, P.K. 61, H-4010, Hungario.

Membrokotizo por transpagipovaj landoj estas 25 ned. guld. aŭ egalvaloro.



Aŝma

Aŝma

Versrakonto de la sania popolo, nacimalplimulto en Ĉinio. Temas pri gefratoj Aŝma kaj Ahej, kaj iliaj aventuroj kaj penoj kontraŭ malbonulo Rabubala. Interalie troviĝas ankaŭ interesaj moroj de sanioj. La traduko estas bela kaj la ilustraĵoj ravaj.

Esperantigis Laŭlum Ilustris Huang Yongyu

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino



Numero: 10-Es-253S 16×18cm. 84 paĝoj bind.

Prezo: £0.95 US\$1.95

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekom-pencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiar-taĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kri-tikoj de la recenzantoj.

LA RED.

AŜMA

AŜMA popolrakonto en versoj, tradukita de Laŭlum, eldonita de la Fremdlingva Eldonejo. Formato: 16 × 18 cm. 84 p. Bindita kaj ilustrita per koloraj lignogra-vuraĵoj. Prezo: \$1. 95.

Aŝma estas bela rakonto en versoj, kiun tradicias tra la gene-racioj la sanioj, branĉo de Ji-nacio, nacimalplimulto en sudok-cidenta Ĉinio, vivanta en Guj-ŝan-distrikto, sudoriente de Kun-ming, ĉefurbo de Junnan-pro-vinco.

Ĉi tiu majstra traduko far Laŭlum estas ne rekte farita el la sania originalo, sed retraduko el la hanlingva traduko, frukto de la komuna laboro far folkloristoj kaj lingvistoj por kolekti ties di-versajn variantojn kaj ilin redak-ti en kompletan formon.

Laŭlum estas jam vaste konata esperanta poeto, kies poemtra-dukojn ambiciajn eĉ el la lingvoj lisua, mjaŭa, mongola, tibeta, uigura ktp oni ĝuis siatempe sur EPĈ. Nu, iu mia esperanta poem-amanto, mem poeto, rifuzas re-cenzi Aŝma tial, ke ĝi ne estas

rekte tradukita el la originalo. Laŭ li la tradukaĵoj oni ne povas juĝi sen scii la originalon, ĉar tiam la ĝusta komparo ne estas ebla. Rezonado certe ne mal-prava.

Tamen ankaŭ tradukaĵoj la esperantistoj povas rajte apreci en sia lingvo Esperanto, ĉar ĝi estas, tute nature, esperanta lite-raturo traduka! Ĉu oni hezitis recenzi Elektitaj Versaĵoj de Ma-rie Under, simple pro nekono pri la estona originalo? Ne gravas, ĉu Laŭlum tradukis senpere el la originalo, aŭ el la hanlingva tra-duko. Sufiĉas nur, se oni legas lian laboraĵon agrable kaj ŝate, kiel esperantan eposon. Kiu ja kapablus kompetente kompari la tradukon kun la originalo, kies lingvon komprenas nur ekstreme malmultego da privilegiitaj spe-cialistoj!

Fakte Laŭlum majstre sukcesis traduki Aŝma, en kiu la tragika vivo de ĉarma knabino samnoma estas vivige rakontata de ŝia nas-kiĝo ĝis la katastrofo. Jen dume ŝi ĝuas feliĉan vivon:

*Tagnokte kreskas Aŝma
kara,
Fariĝis nun ŝi dekses-jara.
Ŝi iras kampen kun la frato
Kun ŝvit' survange en kas-
kado.*

*Sur lia ŝultro — plugoŝpato,
Sur ŝia — korbo por semado.
En fronto fraĉjo Ahej plu-
gas,
La ter' turnate flanken flu-
gas.*

*Tuj post li Aŝma semojn
ŝutas
Jen kvazaŭ cigojn perseku-
tas.*

Kiel agrable efikas la alitera-cioj rakontante la pastoralon de la kampara vivo de Aŝma!

*Sep tagoj iĝis jus paseo,
Ekĝermis semoj poligonaj.*

*Sam-kiel raso de tineo
Disfloras tiuj plantoj bonaj.*

Pro sia rara beleco Aŝma sufe-ras diversajn malfacilaĵojn al ŝi donitajn de vilaĝa potenculo, in-trigantan ŝin edzinigi al sia filo, kaj ŝi estis fine forrabita dum la foresto de sia brava frato Ahej. Jen Ahej decidas ŝin elsavi dum ŝi estis forkondukita kaj mallibe-rigita, rapidegas al la montre-giono:

*Dutag-etapon sola-tage
Galopis li de mont' al
monto,
Sennombrajn montojn kuris
sage,
Torentojn mil transsaltis sen
ponto.*

Dum la serĉkura vagado venis al li maljunulo, kiu respondas al lia demando:

*“Mi ja ne vidis Aŝma-n vian,
Sed grandan geedzigan gru-
pon
En silkaj vestoj, hordon tian
Kia similas grizan nubon.”*

tuj reagis Ahej:

*Kuregas fluge la ĉevalo
En sola spir' tra du montva-
loj.
De l' henoj tremas mont' kaj
l'tero,
La hufoj flugas en aero.*

Fine Ahej sukcesis trovi Aŝma. Sed atendis tie pluraj malfacila-ĵoj, nome konkursoj en enigmo-solvado, hakado de lignoj, sema-do de grenoj ktp. Kiel lerte kaj sukcese venkis ilin Ahej? Nu la leganto mem ĝuu.

La eposo, etute 1458-versa, se mi bone nombris, estas tra l' tuto perfekte rimita jen alterne jen kontinue, kaj la leganto apenaŭ konscius ke li spiras. Komprene-ble li aplikas dum la rimado an-kaŭ abundon da rimoidoj kaj agordoj.

Bedaŭrinde Laŭlum tamen ial ŝparis la penon tuŝi pri la originala poemformo. Pro la belega rimado, ni imagemas, ke ankaŭ la sania originalo estas rimita. Sed ĉu la originalo, aŭ pli ĝenerale, la saniaj versoj estas rimitaj?

Laŭ mia kaprica kompreno Aŝma estas eposo simila al jukaro de la ajnuo, unu el la naci-malplimulto en Japanio. Sed jukaro estas senrima, probable pro la lingva propreco simila al la japana, sed tute alispeca ol Esperanto. Kia do estas la fonologia propreco de la sania? Ĉu la sania poezio estas ankaŭ rimita? Jen kio min interesas tre

multe. Laŭforma traduko de poezio sendube celas, interalie, la reprodukon de la muziko de la originalo ankaŭ en la tradukanta lingvo. Kial do rimi originalon, kiu estas senrima?

Nuntempe "hajko" estas furo-re ŝatata internacie. Hajkon kreas, kiom mi scias, ĉinaj, estonaj, finnaj, francaj kaj usonaj poetoj, kaj ili preskaŭ senescepte rimas siajn hajkojn. Nenion mi protestas kontraŭ tio, ĉar tio estas ja plena libero kaj rajto ĉe la flanko de la ne-japanaj hajkistoj, kiuj estas fieraj, kaj nemalprave, krei novan ĝenron en la esperanta poezio. Tamen rimado de tradukita hajko, mi timas, for-

te falsigus ĉe la aprecio la koncepton pri la originalo, kiu apenaŭ aplikas rimadon, se ne hazarde.

Aŝma estas luksa eldono kun koloraj ilustraĵoj. Ankaŭ kaj precipe la kovrilo estas ĉarma kaj ŝatinda. Libro nemalhavebla por ĉiu amanto de literaturo, ĝenerale, kaj de poezio aparte.

Recenzis **K. MATUBA**

NOTO DE LA REDAKCIO: *Laŭ aserto de s-ro Ma Shaoyun, unu el la kolektintoj de variantoj de Aŝma, la versoj de tiu eposo estas ritmaj kaj rimitaj kaj plejparte konsistantaj el po kvin vortoj unusilabaj.*



Tarifo: 1 internacia respondokupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 23-jara f-ino dez. kor. tm. pri ĉ.t., Mansure Karimi-Gholhak, Dowlat-Merat-Gole Sorkh, 25-Tehran 19517-Irano.
- * 55-jara pensiulino dez. kor. tm. pri ĉ.t., Marzije Ĝalilĝuzarabhane, Negarestan 5-46, Tehran 16-Irano.
- * Mathé Csaba, Varoskuti út 3/B, 1125 Budapeŝt, Hungario, deziras korespondi kun ĉinaj esperantistoj.

- * 31-jara fraŭlo Fariborz Kuchekizad, No.2, Juya Alley, Falahati Alley, Saadi Ave., Radht, Iran, deziras korespondi kun samideanoj de Ĉinio pri iu ajn temo precipe lingvistiko.
- * Hungara lernantino Kovacs Csilla, H-6600 Szentcs, Arvai B.u. 42, Hungario, volas korespondi kun lernantinoj de oka klaso.
- * 15-jara Farkas Emöd, volas korespondi kun samaĝa knab(in)o. Adreso: 3400 Cluj-Napoca, PTA Mihai Viteazul 3-4, et. II. Ap. 1. Rumanio.
- * Sino Dupont, Rue de Henne 16, 4920 Embourg, Belgio, deziras serĉi esperantistojn el Ĉinio kaj el alilandoj.
- * Fraŭlino Grazyna Laszczak, 32-650 Kety, ul. Fabryczna 13, Pollando, deziras korespondi kun esperantistoj tutmonde.
- * Fitim Skenderi (12-j.), Rr. Rifat Vidishiqi 120, 38220 Mitrovicë e Titos, Kosovë, Jugoslavio, deziras korespondi kun geknaboj samaĝaj.

- * Rolf Weser, Dimitroffstr. 24/HH, DDR-7010, Leipzig, deziras korespondi tutmonde.
- * S-ro Peter Bolter (43-jara), komputera specialisto, dez. kor. tutmonde pri sia profesion, politiko kaj sporto. Adr. : Schützenstr. 46. 791 Neu-Ulm Okc. Germanio.
- * 35-jara Czeslaw Gluza deziras korespondi tutmonde pri Taoismo, Budhismo, akupunkturo, la Tai-ji-quan, la spira gimnastiko k. t. p. Adreso: 32-650 Kety, Os. 700-Lecia 18-17, Woj. Bielsko-Biala, Pollando.
- * 45-jara laboristo Ingmar Fors, Torngatan 6, 66057 Väse, Svedio, dez. kor. tutmonde pri turismo, ĉiutaga vivo, fremdlingvoj kaj naturo.
- * Korespondpartnerojn deziras s-ino Rita Exner, Steinmetzstrato 23 en D-1000 Berlino-30, West-Berlin (Okcidenta Berlino). Ŝi estas 39-jara kaj 1,60 m. alta, interesiĝas pri muziko kaj aliaj interesaj hobiaj.

ESP-KURSO EN "LA MONDO"

Post kiam la Eduka Ministerio de Ĉinio denove anoncis, ke Esperanto estu instruata en ĉinaj altlernejoj kiel nedeviga lernoobjekto, pli kaj pli da homoj deziras lerni la lingvon. Por kontentigi ilian deziron, la redakcio de "La Mondo", revuo de la Ĉina Esperanto-Ligo, decidis, ke ekde la kvara numero de 1983 la revuo ekfunkciigos kurson de Esperanto kaj dediĉos 3-4 paĝojn al solvo de demandoj de komencantoj. La kurson gvidos Li Shijun (Laŭlum), membro de la Akademio de Esperanto kaj de la Konstanta Komitato de ĈEL.

"VIVO DE ZAMENHOF" ELDONITA EN LA ĈINA LINGVO

La ĉina eldonejo "Scioj" eldonis marte en Pekino la libron "Vivo de Zamenhof", verkitan de Edmond Privat kaj ĉinigitan de Gong Peikang. Jam en la tridekaj jaroj oni

publikigis la verkon en ĉina vesto. S-ro Gong elesperantigis la kvinan eldonon publikigitan de la Esperanta Eldona Limigita Kompanio de Brito en 1967. En la libro estas sep fotoj pri Zamenhof, liaj edzino kaj gepatroj.

ESP-MOVADO EKVIGLIS EN HEBEI

Lastatempe en la provinco Hebei, najbara al Pekino, ekviglis Esp-movado, kiu silentis multajn jarojn. Nun oni fondis Esp-instituton en la provinca ĉefurbo Shijiazhuang kaj Esp-grupojn en Handan, Baoding, Tangshan, Cangzhou, Zhangjiakou kaj aliaj urboj de la provinco. En iuj urboj oni funkciigis Esp-kursojn. Post sia fondiĝo la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de Hebei multe laboris por propagandi nian lingvon. La duan de aprilo la Hebei-a Ĵurnalo, la plej granda en la provinco, informis pri labor-kunveno de la prepara grupo.

NOVAJ ESP-ORGANIZOJ EN JINGZHOU KAJ MIANYANG

La 2-an de majo oni fondis la Esperanto-Asocion de Jingzhou,

Hubei-provinco, kies inaŭguron ĉeestis pli ol 300 personoj, inkluzive de Li Timin, vicestro de la Propaganda Departemento de la Jingzhou-subprovinca Parti-komitato, kaj Zhang Sihua, prezidanto de la Scienc-teknika Komitato de Jingzhou-subprovinco. Posttagmeze de tiu tago okazis renkontiĝo inter ges-anoj de Jingzhou kaj Shashi en la parko Zhongshan de Shashi kaj ekspozicio de eksterlandaj poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj kaj Esperantaj eldonaĵoj.

Je la 15-a de majo ĉ. 300 membroj de la studrondo "Verda Stelo" en Mianyang, Sichuan-provinco, kunvenis en la Instruista Kolegio de Mianyang por festi la fondon de la studrondo. La kunvenon partoprenis ankaŭ reprezentantoj de Esp-asocioj de Chengdu kaj Chongqing.

El aliaj lokoj de Ĉinio: (1) La rapida disvolviĝo de Esp-movado en Shandong-provinco vekis atenton de famuloj en kaj ekster la provinco. La Unua Plena Sesio de la Shandong-a Komitato de la Kvina Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco okazigita en aprilo aprobis proponon fondi la provincan Esp-asocion, celante subteni la Esp-laboron de la provinco.

(2) En marto Lan Jiang, anglingva instruisto de la Zhenjiang-a Ŝip-fara Instituto, proponis, ke oni prenu Esperanton kiel ekzamenan objekton por sia ofic-titolo. La instituto komisiis al la Zhenjiang-a Esperanto-Asocio ekzameni la kandidaton. Lan Jiang jam sukcese trapasis la ekzamenon. En multaj lokoj jam ekefikis la anonco farita de la Eduka Ministerio de Ĉinio en decembro 1982.

(3) Meze de majo la Fervoja Asocio de Interna Mongolio ekfunkciigis en Huhhot Esp-kurson kun 90 junaj kaj mezaĝaj lernantoj, inkluzive fervojajn inĝenierojn, teknikistojn, kadrojn kaj laboristojn. Ĉe la inaŭguro ĉefinĝeniero Ye

La studrondo "Verda Stelo" inaŭguras sian fondiĝon en Mianyang.





Esperanto-fako de Radio-Zagreb en laboro

Jian kaj Li Sen de la Huhota Fervoja Buroo kaj Ge Shouji, vic-prezidanto de la Fervoja Asocio de Interna Mongolio, donis kuraĝigajn vortojn al la lernantoj.

El Jugoslavio: (1) Je la 11-a de marto 1983, delegitaron de Jugoslavia Esperanto Ligo akceptis prezidanto de Socialisma Unuiĝo de Laboranta Popolo de Jugoslavio Marin Cetinić kaj prezidanto de ĝia Kunordiga Komitato por Sociaj Organizoj Jivan Vasiljević. Dum kunsido oni pritraktis preparojn por la 100-jara jubileo de Esperanto en Jugoslavio, la pozicion de Esperanto en Jugoslavio kaj kelkajn iniciatojn por agadoj internealiancitaj landoj. Por ĉiuj iniciatoj JEL ricevis plenan subtenon kaj eblecon realigi ilin pere de diversaj sekcioj en la menciita organizo.

(2) Esperanto-fako de Radio-Zagreb elsendas unufoje semajne Esperantajn programojn en 15 minutoj. Dum la pasintaj 30 jaroj, 1600 programoj sur pli ol 13000 paperfolioj estis legitaj antaŭ mikrofono. Radio-programoj estas multe pli internaciecaj ol la televidaj, plejparte turnitaj nur al la enlanda publiko.

El Hispanio: (1) "Fundacion ESPERANTO" decidis organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Premio: 10 000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Subpremio: 5 000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj infanaj rakontoj originalaj aŭ tradukitaj, verkitaj en facila lingvo, por ekinstrui Esperanton al infanoj havantaj la aĝon de sep ĝis dek jaroj. La rakontoj povas esti ilustritaj aŭ nur literaturaj. Pro ĝia ebla eldonado la ilustraĵoj devos esti originalaj.

Regularo: 1. Ĉiu konkursaĵo ampleksu 2-3 foliojn; 2. Ĉiu konkurstanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko: Por la Konkurso de "Fundacion ESPERANTO"; 3. La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkurstanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkurstanto; 4. Kiam publikiĝos la verdikto, publikiĝos

samtempe la nomoj de la juĝintoj; 5. La datlimo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 15-a de septembro 1983; la verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1983; 6. Oni sendu la tekstojn al Ines Gaston, P de la Constitucion, 35, 4 dcha. Zaragoza-1, Hispanio.

(2) BARCELONA ESPERANTO-CENTRO okazigos Internacian Literaturan Konkurson "RAMON MOLERA" kun la celo festi la 75an datrevenon de Universala Esperanto-Asocio kaj omaĝi al Ramon Molera, la eminenta ekĉefdelegito de UEA kaj membro de la nomita centro, forpasinta la 28-an de januaro. Regularo estas:

1. Ununura temo: rakonto en kiu rolu la **Delegita Reto** aŭ **UEA-Delegito**; la temo povas esti anekdoto, fantaziaĵo, spritaĵo, k.c.; 2. La verko povas esti proza aŭ versa; ĝi ampleksu maksimume 1500 vortojn. Originala kaj verkitaj en Esperanto; 3. Oni sendu 4 ekzemplerojn de la kontribuajo, tajpitajn je duobla interspaco; 4. Por ke la nomo de la aŭtoro restu nekonata, krom la titolo oni aldonu specifan pseŭdonimon, kaj en aparta fermita koverto, oni kunsendu la nomon kaj adreson kune kun la titolo kaj uzita pseŭdonimo; 5. La ĵurio aljuĝos tri premiojn kaj laŭ sia decido ankaŭ honorajn subpremiojn kaj menciojn. Ĉiu gajninto ricevos: diplomon kaj 5 ekzemplerojn de la publikigota verko; 6. Ĉiu konkurstanto ricevos senpage ekzempleron de libro enhavanta la premiitajn verkojn kaj meritplenajn konkursaĵojn. Oni rajtas prezenti nur unu verkaĵon, kaj ne rajtas konkuri pere de verkoj jam premiitaj aŭ publikigitaj; 7. Ĉiuj konkurstantoj povus ĉerpi informojn el "Jarlibro 1982", paĝoj 77 ĝis 80; 8. Limdato ĝis la 30-a de septembro de 1983; 9. Oni aljuĝos la premiojn okaze de speciala FESTO aranĝota la 4-an de decembro ĉe la sidejo de B.E.C., str. Carreras Candi 34-36 Barcelono-28, Hispanio.

VIGLA JANGZI- RIVERA TRAFIKO

Fotoj de SHEN YANTAI
kaj XIN HUA




Ce la hela montgorĝo Wuxia de Jangzi-rivero


Jangzi, 6 300 kilometrojn longa, estas la plej granda rivero de Ĉinio. Ĝi fontas el la Qinghai-Tibeta Altebenajo kaj fluas en la Orientan Ĉinan Maron. Ĝi estas la ĉefa orient-okcidenta surakva transporta linio, kies navigebla longo inkluzive de tiu de la branĉoj atingas pli ol 70 000 kilometrojn. Ĝia danĝera parto en Sichuan-provinco plena de rifoj fariĝis facile navigebla post ordigo. Dank' al apliko de trenaj ŝiparoj puŝataj per barĝoj, kontenera transportado kaj aliaj avangardaj metodoj, senĉese pliiĝis ĝia var-transporta kvanto. La jara transporta kvanto jam atingis pli ol 45 milionojn da tunoj kaj la jara persontrafika kvanto 30 milionojn da homfojoj.

Ambaŭ ĝiaj bordoj estas punktitaĵoj de antikvaj vidindejoj kaj belaj pejzaĝoj, tial ĝi ĉiam altiras al si multajn en- kaj eksterlandajn turistojn.



Pasaĝera ŝipo trapasas la montgorĝon Qutangxia.






La Yuxikou-a Karbo-transporta Doko en la provinco Anhui



La Gezhoubu-a Akvorezervejo en la meza Jangzi-rivero jam oficiale malfermiĝis al navigado. La foto montras ŝipojn trapasantajn la ŝipluzon.




La ripozĉambro sur la turisma ŝipo Kunlun



Badong-haveno en la Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero

Kajo de Fengjie-gubernio ĉe la montgorĝo Qutangxia



Ĉiam antaŭeniranta homo

— PRI KURACISTO ZHOU LIRONG FIDELE
SERVANTA AL KAMPARANOJ



Zhou Lirong

ANTAŬ 35 jaroj oni amputis al juna metilernanto la montran fingron de la dekstra mano, kiu hazarde vundiĝis je maŝino. La akcidento turnis la knabon al diligenta lernado; li fine sukcesis rekte eniri en superan mezlernejon sen lerno en la elementa kaj pli poste en medicinan instituton. Hodiaŭ, tiu kuracisto, kiu perdis du falangojn siatempe, replantis por kamparanoj pli ol 60 derompitajn fingrojn sub mikroskopo. Li nomiĝas Zhou Lirong kaj laboras en la gubernio Dancheng de Henan-provinco.

KOMENCO DE NOVA VIVO

Antaŭ ol Zhou Lirong diplomitiĝis el la Unua Medicina Instituto de Ŝanhajo, li havis okazon provi sian praktikon en la kamparo kaj propraokule vidi, ke tie ankoraŭ terure mankas necesaj medicinaj kondiĉoj. Tio ŝanĝis lian deziron resti en iu

granda hospitalo aŭ instituto en Ŝanhajo post la diplomitiĝo. Trifoje li skribis al la gvidantaro de la medicina instituto, ke oni sendu lin labori en la kamparo. En 1958 li fine iris al la malgranda gubernio Dancheng kune kun sia edzino, kiu antaŭe laboris kiel flegistino en granda hospitalo en Ŝanhajo.

Komence, la vivo en Dancheng estis multe pli malfacila ol li iam imagis, sed li ne retiriĝis, pensante, ke la malsanuloj tie lin bezonas. En la tuta gubernio li estis la unua diplomito el fama medicina instituto; oni nomis lin “Granda Kuracisto el Ŝanhajo”, kvankam li tiam estis nur 23-jara. Ĉiutage lia kabineto estis pacient-plena.

Li klare sentis la pezecon de sia devo. Por ne malesperigi la popolon, li penis altigi sian kuracarton. Tage li akceptis pacientojn kaj vespere sidis super libroj ĝis malfruj horoj. Eĉ survoje li

daŭrigis sian legadon. Sub la helpo de diversaj lokaj maljunaj ĉin-medicinaj kuracistoj, li kolektis al si multajn popularajn kaj pruvitajn receptojn. Per ĉio ĉi li baldaŭ adaptiĝis al la bezono de kampara hospitalo kaj fariĝis tia kuracisto, kiu povas trakti malsanojn internajn, kirurgiajn, ginekologiajn, pediatriaajn, nervajn k. a.

“PRENU MIAN SANGON!”

En la komenco de la 60-aj jaroj, naturaj katastrofoj kaj aliaj kaŭzoj trudis al la nova Ĉinio malfacilan periodon, kiu daŭris tri jarojn. Zhou Lirong tiam suferis de hidropso pro subnutrado. Iutage virino kun okuloj ruĝaj pro plorado portis antaŭ lin infanon, kiu, terure osteca kaj flava, kun fermitaj okuloj kaj malforta spirado, suferis je iktera hepatito rezulte de serioza subnutrado. Urĝa kuracado estis necesa.

“Li bezonas transfuzon!” preskribinte, Zhou diris al la patrino de la malgranda paciento.

“Transfuzo? Kiom tio kostos? Mi. . . mi devas reiri al mia vilaĝo por prunti la monon,” ŝi murmuris en embaraso. Aŭdinte tion, Zhou forstrekis el la preskribo la indikon pri transfuzo kaj diris: “Nu, iru preni nur la medikamentojn, kiuj kostos al vi ne pli ol kelkdek cendojn.”

Kiam ŝi iris al apoteko, Zhou etendis la brakon por ĉerpigi sian sangon per flegistino. Vidinte tion ĉe sia reveno, la patrino de la infano alkuris kaj lin malhelpis kun larmoj: “Ne, doktoro Zhou, neniel, eĉ se mia infano mortus!”

“Prenu mian sangon!” “Prenu mian!” proponis ĉiuj flegistinoj kaj asistantoj kun brako etendita. “Ne,” diris Zhou kategorie, “ne estas sufiĉe da tempo por analizi viajn sangojn. Mia sango estas de O-grupo. Prenu mian!”

200 ml. da sango iom post iom fluis en la angiojn de la malgranda paciento. La knabo eldanĝerigis, sed Zhou falis en sveno.

Neniu povas precize diri, kiom da fojoj Zhou oferis sian sangon por savi gravajn malsanulojn en

la pasintaj pli ol 30 jaroj, sed almenaŭ 9 el tiaj okazaĵoj restas klare memoreblaj.

POR KE VUNDITOJ NE KRIPLIĜU

Kun la disvolviĝo de agrikultura meĥanizado, plimultiĝis laborakcidentoj en la kamparo. Ofte okazis, ke kelkaj kamparanoj portis al Zhou Lirong vunditon kun derompita sanganta fingro aŭ brako kaj petegis: “Doktoro, ĉu vi povus replanti por li. . .? Li ja estas ankoraŭ juna, li devas vivteni sian tutan familion!”

Sed ĉu tio eblus en malgranda gubernia hospitalo, kie estas nek taŭga teknika forto nek necesaj materialaj kondiĉoj? Tio kion doktoro Zhou povis fari, estis nenio alia ol purigi kaj suturi la vundon. En tiaj okazoj la malfeliĉo de pacientoj forte lin afliktis. Li pensis, ke la plej granda doloro por kuracisto estas montriĝi senpova antaŭ la paciento.

Ĉu kamparanoj devas kripliĝi, kiam ili rompis al si fingron aŭ brakon en akcidento? Ekde la jaro 1970 li decidis esplori la malfacilan problemon de mikroskopa kirurgio — la replantado de rompita fingroj kaj membroj.

Li kolektis al si ĉiujn koncernajn dokumentojn en- kaj eksterlandajn, kiujn li povis akiri, kaj antaŭ ĉio sin okupis pri teoria studo. En 1973 li petis lerni en la Sesa Popola Hospitalo en Ŝanhajo, kiu skuis la mondon per sia sukcesa replantado de rompita membro en 1963 kaj tiu de rompita fingro en 1966.

La nomita hospitalo tamen donis al li permeson lerni nur unu semajnon. Ne gravas, li pensis, se nur ĝi konsentas enlasi lin. Tie ĉiumatene li venis en la malsanulajn ĉambrojn por fari plej diversajn laborojn, ekz., pretigi trinkakvon, balai plankojn, purigi necesejojn, lavi kraĉujojn ktp. Lia fervoro forte kortuŝis la kuracistojn kaj flegistinojn. Unu semajno pasis; ili ne nur ne foriris lin, sed ĉiam volontis lin informi, kiam okazos operacio aŭ prelego. Tiamaniere li lernis en la hospitalo ses monatojn kaj faris notojn el 200 000 vortoj.

Post tio li aĉetis koncernajn medicinajn instrumentojn. Dank’ al lia klopodo, la mikroskopa kirurgio unuafoje okazis en gubernia hospitalo de Ĉinio — la Popola Hospitalo de Dancheng-gubernio.

Zhou Lirong purigas la replantitan fingron de la knabino per medicina likvaĵo.



La maldekstra dikfingro de la infano estis tranĉe derompita. Zhou Lirong sukcese replantis la fingron derompitan antaŭ 29 kaj duona horoj. Jen la mano kun la revivigita fingro.



UNUA SUKCESO

En 1975 Zhou Lirong sukcesis en replantado de rompitaĵaj brakoj. Poste li direktis sian provadon al tiu de rompitaĵaj fingroj.

La fingraj angioj ĝenerale estas nur 0.3 mm. dikaj, sed por kunligi unu rompitan angion estas necese fari 4-8 kudrerojn. La fadeno, dika je 10- ĝis 5-ono de haro, estas rompiĝema, kaj la kudrilo, 0.5 cm. longa, facile fleksiĝas ĉe ekstremo de la mano. Nur tiu, kiu kapablas replanti rompitaĵajn orelojn por kunikloj kaj kunligi rompitaĵajn angiojn en la kruroj de musoj, povas revivigi al homo fingron derompitan. Tial, en ok monatoj Zhou Lirong enfermis sin en sia laboratorio ĉiuvespere kaj sin ekzercis ĝis perfekta lertiĝo.

Kvazaŭ por lin elprovi, post nelonge lin defiis tre malfacila operacio: Han Luliang, ĉarpentisto, rompis al si la ringan fingron je elektra segmaŝino. Tri horoj jam pasis, antaŭ ol oni konservis la derompitan fingron en fiziologia salakvo unu kaj duonan horojn kaj poste en fridujo unu horon. Ĉu fingron tiel grave malpurigitan kun angioj kaj nervoj ŝvelintaj oni ankoraŭ povus revivigi? Similan kazon Zhou neniam vidis en la en- kaj eksterlandaj materialoj, sed li decidis akcepti la defion.

Je la dua posttagmeze la operacio komenciĝis. Oni maltrankvile atendis kaj atendadis ekster la operaciejo, ĝis la kokeriko anoncis la alvenon de la mateno.

Tiam la pordo de la operaciejo malfermiĝis kaj elvenis Zhou kun lacaj paŝoj. Kiel li bezonis kaj deziris iom ripozi hejme en tiu momento! Sed ne. Li tuj iris al la malsanula ĉambro, ĉar li komprenis, ke la sukceso en la operacio ne signifas sukceson de

replantado; la eventuala trombo en la rekunigitaj angioj povus esti al la replantita fingro gangrenon ĉiumomente, se oni ne donus ĝustatempan kuracadon. Li persone flegis la malsanulon, ĝis la fingro reviviĝis post dek tagoj.

Kiam la ĉarpentisto elhospitaliĝis post duona monato, la replantita fingro jam povis moviĝi. Post du monatoj li sciigis al Zhou en sia letero, ke la fingro jam funkcias normale. Tiu ĉi sukceso multe kuraĝigis la kuraciston.

TUTKORA SERVADO AL PACIENTOJ

Pasintjare, iu kamparano estis grave brulvundita, ke lia kolo adheris al lia brusto. Zhou Lirong decidis fari al li haŭtan grefton, nome, apartigi la adherintajn haŭtojn, preni pecon da haŭto de lia dorso por ĝin enplanti sur lian kolon kaj poste preni same grandan pecon de lia femuro por ĝin enplanti sur lian dorson.

Dum la operacio subite la abdomeno forte doloris Zhou, ke ŝvito kovris lian paliĝintan vizaĝon. Flegistino prenigis al li superdozon da analgeziko, sed eĉ tio ne helpis. Malgraŭ ke liaj ĉeestantaj kolegoj insiste konsilis al li ripozi iomete, li ne haltigis la skalpelon en la mano, ĉar li sciis, ke la eltranĉita haŭta greftaĵo ne povas longe resti sen sango, kaj la interrompo eble fiaskigos la tutan operacion. La operacio daŭris dek du horojn kaj, kiam Zhou finis la lastan kudreton, li mem falis elĉerpita apud la operacia tablo. Tio kortuŝis la ĉeestantojn ĝis larmoj.

Liaj kolegoj diris, ke foje kiam en la hospitalo estis multaj

pacientoj, Zhou eĉ deĵoris en sinsekvaj pli ol 50 diurnoj, ripozante nur 3-4 horojn ĉiutage.

ĈIAM ANTAŬEN!

Dum la daŭro de pli ol 20 jaroj Zhou sukcese faris ĉirkaŭ 10 000 operaciojn. Nun li povas revivigi ne nur tranĉe derompitaĵajn fingrojn, sed ankaŭ preme aŭ ŝire derompitaĵajn; ne nur fingrojn rompitaĵajn je la baza falango, sed ankaŭ tiujn rompitaĵajn je la unga falango; ne nur ĵus rompitaĵajn fingrojn, sed ankaŭ tiujn derompitaĵajn antaŭ 23 horoj kaj 5 minutoj. Kiam fingro de mano estas tro severe difektita por replantado, li povas ĝin anstataŭigi per tiu de piedo. Cetere, li plurfoje sukcesis en libera greftado de granda epiploo, ostoj kaj angioj. Kune kun siaj kolegoj, li eĉ savis pacieron, kies korpo estis 93-pocente brulvundita.

Antaŭ nelonge li ĉeestis la preparan kunvenon por starigi tutlandan organizon pri mikroskopa kirurgio. Ĉe la kunveno famaj specialistoj kaj profesoroj el diversaj lokoj de la lando aŭskultis lian raporton, kun granda admiro pri la brilaj fruktoj de lia kreiva laboro.

Ilia alta taksado pri lia laboro lin kortuŝas, sed samtempe maltrankviligas. Li scias, ke kvankam li akiris kelkan sukceson en sia praktiko, li tamen devas senĉese iri antaŭen en sia esplorado, ĉar hodiaŭ la mikroskopa kirurgio en la mondo jam komencas turni sian atenton al pli kompleksa, pli delikata kaj heterogena operacio, kaj multe da problemoj tiuflanke atendas solvon.

Antaŭ nelonge la popola registaro de Henan-provinco honoris lin per la titolo "Bona Kuracisto de la Popolo".



Zhang Jingqi en sia oficejo

XU BAOFU:

METEOLOGIA INGĜENIERINO EL XISHUANG- BANNA

FFRUMATENE, kiam malaperis densa nebulo super la Ŝanhaja Hongqiao-aerodromo, arĝentaj aviadiloj komencis surteriĝi unu post alia. Pasaĝeroj multe laŭdis precizecon de la vetera antaŭdiro fare de la meteorologia stacio de la flughaveno.

Tiam veterinformaj laborantoj en blankaj kostumoj ankoraŭ estis okupataj en la veterinforma ĉambro de la flughaveno. Inter ili troviĝis altastatura virino kun gaja humoro. Ŝi estas 50-jara Zhang Jingqi, la unua naŝi-nacie-

ca meteorologia inĝenierino de Ĉinio, kiu sin okupas pri vetera prognozado kaj esplorado jam 30 jarojn.

INFANAĜO

La hejmloko de Zhang Jingqi troviĝas en la Lijiang-a Naŝi-nacieca Aŭtonoma Gubernio en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Tie ĉiam regas milda printempo, kaj la loko estas konata kiel kame-lia lando. En 1932 Zhang Jingqi naskiĝis. Trovinte, ke la bebo

estas ina, ŝiaj gepatroj volis sendi ŝin al montregiono por ŝanĝi ŝin kontraŭ knabo. Sed la avino ne konsentis, timante, ke la malgranda Jingqi mortos de malvarmo aŭ malsato en la malriĉa montregiono. Tial ŝi estis restigita.

De tiam la avino des pli amis ŝin, kaj vestis ŝin per knabaj vestoj.

Zhang Jingqi vizitis elementan lernejon en la aĝo de 6 jaroj. Estis tre malofte, ke la naŝiaj knabinoj vizitis lernejon. Tial ŝi ofte estis ofendita de petolemaj knaboj. La avino do ĉiutage akompanis ŝin al la lernejo, iam eĉ gardis ŝin ekster la klasĉambro. Zhang Jingqi ne vanigis la esperon de la avino, kaj ĉiam estis unu el la plej eminentaj en la lernado.

MISTERA FULMOTONDRO

Estas kaprica la vetero en Lijiang-regiono, kie multe fulmotondras en somero, kaj preskaŭ ĉiujare okazas morto pro fulmotondro aŭ monta torento. Foje, sekvante samvilaĝanojn, kiuj vizitis foiron en najbara urbeto, la patrino kun Jingqi iris viziti sian patrinon. Ne volante disiĝi de la avino, Jingqi kaj kriis kaj ploris survoje. Vole nevole ŝia patrino devis rekonduki ŝin hejmen. Apenaŭ ili atingis la hejmon, la serena ĉielo estis kovrita de nigra nubo en palpebruma daŭro. Falis pluvego kaj furiozis monta torento, de kio mortis aŭ vundiĝis multaj foirvizitantoj. Zhang Jingqi kaj ŝia patrino feliĉe evitis tiun katastrofon.

Samvilaĝanoj estis mirigitaj de tio. Sortodivenistoj asertis, ke Zhang Jingqi havas favoran sorton kaj ŝi estis dia knabino antaŭ sia naskiĝo, eĉ la Tondra Dio ne

kuraĝis ŝin tuŝi. Tamen ĉi-foja fulmotondro vekis ĉe ŝi scivolemon kaj serion da demandoj. De tiam la mistera fulmotondro firme kaptis ŝian koron.

EN KUNMING

Post diplomitiĝo en la malsupera mezlernejo, Zhang Jingqi forte deziris iri al la provinca ĉefurbo Kunming por viziti superan mezlernejon. Multaj bonkoraj samvilaĝanoj deadmonis ŝin, dirante, ke naŝioj tie suferos diskriminacion. Sed la obstina knabino jam faris decidon kaj, subtenate de la avino, ŝi fine iris al Kunming. Tiam ŝi estis nur 15-jara.

En Kunming anstataŭ naŝiaj vestoj ŝi portis sur si la hanajn kaj ĉiel imitis parolojn kaj agmanierojn de la hanoj. Post klopodo ŝi sukcese trapasis la eniran ekzamenon de la Kunming-a Knabina Mezlernejo. Ĉar ŝi malbone parolis la hanan lingvon, ŝia nacieco estis malkovrita. Sekve de tio atakoj kaj insultoj ofte afliktis ŝin, kaj pro tio ŝi ofte ploris kaŝe.

Ĝuste kiam Zhang Jingqi estis preta ĉesigi sian lernadon, naskiĝis la nova Ĉinio. Kun florbukedo en la mano, ŝi, kune kun siaj instruistoj kaj kunlernantoj, iris al stratoj por celebri tiun grandan feston. Kantante kaj dancante, ili dronis en senlima ĝojo. La sincera kaj ĉiuflanka zorgado fare de la popola registaro al la nacimalplimulto multe kuraĝigis ŝin por daŭrigi la lernadon.

En la fino de 1950, antaŭ ol diplomitiĝi en la supera mezlernejo, ŝi jam sukcesis en la enira ekzameno de la Kunming-a Civila Aviada Lernejo nove fondita kaj post nelonge oni sendis ŝin en la Tianjin-an Aviadan

Lernejon. Dum tiu tempo ŝi studis aerodinamikon, hidromekanikon kaj aliajn fundamentajn teoriojn. Post tri jaroj, ŝi estis sendita al meteologia lernejo en Nankino por lerni tie meteorologion. Tiam ŝi ekmemoris la fulmotondron okazintan en ŝia infanaĝo. Ŝia deziro esplori la veteran misteron finfine efektiviĝis, kaj ŝi tuj ekamis tiun fakon.

Zhang Jingqi eklaboris post sia diplomitiĝo kaj poste ŝi estis sendita al Ŝanhajo por lerni veteran prognozadon. Dum la lernotempo de unu kaj duona jaroj ŝi posedis pli da scioj pri meteologia teorio. Post la lernado, ŝi eklaboris pri vetera prognozo en la meteologia stacio de la Ŝanhaja Hongqiao-flughaveno. Ŝi tie persistis en lernado kaj zorge akumulis sperton en sia praktikkado por senĉese altigi sian laborkapablon.

Iun tagon, densa nebulo regis super la aerodromo. Laŭ la raporto de la veterprognozistoj de la antaŭa skipo, oni jam decidis malpermesi surteriĝon sur la aerodromo. Post kiam Zhang Jingqi transprenis la deĵoron, ŝi tuj faris atenteman analizon al la akiritaj meteologiaj donitaĵoj kaj konstatis, ke la nebulo baldaŭ disiĝos. Kion fari? Ja granda estos risko, se ŝi ŝanĝos la veteran prognozon de la deĵorantoj de la antaŭa skipo. Ĉiu ajn eraro alportus nekalkuleblan perdon.

Tamen, ŝi senhezite neis la antaŭan veterprognozon. Baldaŭ la nebulo super la aerodromo iom post iom disiĝis. Kiam Zhang Jingqi vidis, ke aviadiloj surteriĝis unu post alia, ŝi faris facilan elspiron.

Dum la pasintaj 30 jaroj, Zhang Jingqi ne nur devis foje kaj refoje fari skribajn antaŭsciigojn pri vetera stato al la aerodroma direktoro, sed ankaŭ sendi ilin per telegrafia kodo al koncernaj meteologiaj unuoj en eksterlandaj. En tiuj grandkvantaj kaj komplikaj laboroj ŝi neniam faris gravan eraron. Ekzemple, pli ol 90% de ŝiaj veterprognozaj en la lastaj kvin jaroj estis ĝustaj. Ŝiaj bonaj laboroj estis laŭdataj de ŝiaj kolegoj. En 1981 ŝi estis promociita al meteologia inĝeniero. Ŝi estas ankaŭ popola reprezentanto kaj membro de la Komitato por Naciaj Aferoj de Ŝanhajo. En julio de 1982, kiel membro de la Ŝanhaja Nacimalplimulta Vizitgrupo ŝi vizitis Kunming.

Aplikante la sciojn akiritajn en la longtempa praktikado, Zhang Jingqi verkis artikolojn "Nebulo super Hongqiao-aerodromo", "Printempa Fulmotondra Pluvo super Hongqiao-aerodromo" kaj aliajn, en kiuj ŝi prezentis rimedojn de vetera konjektado kaj eksplikis ilin en teorio. Iuj ŝiaj kolegoj konsultis ŝiajn verkojn, dank' al kio 94% de iliaj prognozaj estis ĝustaj.



Zhang Jingqi kaj ŝiaj edzo kaj gefiloj

KVAR SEMEROJ DE KUKURBO



Por Komencanto!

PASIS la dormanta vintro kaj venis la milda printempo! Birdoj kantas, floroj ridas. . . La naturo reviviĝas kaj donas al ni diversajn kolorojn.

Estis la sezono por semi. Antaŭ kelkaj tagoj la patro donis al mi kvar semerojn de kukurbo¹, dirante: "Semu ilin en la korto. Tio eble alportos al ni iom da plezuro."

Nia hejmo lokiĝas ĉe montpiedo. Mi semis ilin inter du arboj surmonte. Depost tiam mi preskaŭ ĉiutage iris tien rigardi, ĉu ili ĝermas² aŭ ne. Tiu afero ĉiam alkroĉis³ mian koron kaj portis al mi esperon kaj plezuron.

La suno varmigis la teron kaj pluveto feliĉigis la homojn. Post ankoraŭ kelkaj tagoj mi venis tien kaj ĝoje vidis, ke elteriĝis la ĝermoj de tri semeroj.

Tion mi tuj diris al la patro. Li demandis ridete: "Kial nur tri plantidoj?" Bedaŭrinde, unu ne ĝermis. Eble ĝi ne havis forton ĝermi kaj mortis sub la tero.

Pasis pli da tagoj, la tri plantoj jam havis grandajn verdajn foliojn kaj longajn lanugajn⁴ tigojn⁵. Mi ofte ilin akvumis kaj sterkis⁶. Ĝuste en tiu tempo mi vizitis mian avinon kaj tie vivis unu monaton. Reveninte, kiam mi iris rigardi la plantojn, mi estis mirigita. Ili ne nur ne

floris, sed male, velkis⁷. Mi forte malesperis pro tio kaj ne plu volis rigardi ilin.

Post somero sekvas aŭtuno. Iutage mi promenis en la korto. La patro ĝoje diris al mi: "Via kukurboplanto jam donas grandan frukton. Ni rigardu ĝin!" Ho, vere granda kukurbo, ĝia tigo rampis⁸ sur la pinton de arbo! La aliaj du mortis, ĉar la du arboj forprenis de ili sunlumon


kaj la nutron⁹.

Mi kaj la patro pensis senvorte: "Kial la kvar semeroj havas tiel malsamajn sortojn?"

Novaj Vortoj

1. kukurbo: unujara herbo volvo-grimpanta, kies variforma frukto estas uzata kiel legomo.
2. ĝermi: komenci kreski.
3. al-kroĉi: alteniĝi, alligiĝi.
4. lanugo: mola harkovraĵo de iaj plantoj.
5. tigo: trunketo de planto, kiu portas foliojn, florojn kaj fruktojn.
6. sterko: ĉia substanco uzata por plibonigi kulturgrundon kaj tiel rapidigi kreskadon de plantoj.
7. velki: sekiĝi pro perdo de akvo.
8. rampi: sin movi supren laŭ io.
9. nutro: tio, kion oni donas al vivanta estajo por daŭrigi ĝian vivon.





Stona pavo ĉe Longwang-gorĝo

VIDINDAJ LOKOJ

Pitoreska Wuyang-rivero

de ZONGGONG kaj ZHENGYANG

WUYANG-RIVERO, unu el la kvin branĉoj en la supra baseno de Yuanjiang-rivero, kuras en la orienta parto de la Guizhou-a Altebenaĵo kaj enfluas en Yuanjiang-riveron. Ambaŭborde de la rivero kreskas ĉielskrapantaj antikvaj arboj kaj verdaj bambuaroj. Tie staras kuriozaj krutaĵoj kaj abundas kavernoj, pro kio oni nomas la lokon kaverna mondo.

La urbeto Zhenyuan, dense loĝata de mjaŭ-nacieco, sin trovas en la orienta parto de Guizhou-provinco. Ĝi estas antikva urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. La montoj Shiping kaj Zhonghe kaŭras respektive norde kaj sude de la urbo, kiun trafluas Wuyang-rivero. Pro tio la loko estas konata kiel strategia punkto. Ĉirkaŭe dislokiĝas multaj historiaj lokoj, kiuj allogas al

si turistojn. Tie estas precipe vizitinda la konstruaĵaro de Qinglong-kavernaro oriente de la urbo.

La kaverno Qinglong konsistas el pli ol dek palacoj kaj kavernoj, kiaj kavernoj Zhongyuan kaj Ziyang, Kaverno de la Ĉiela Imperiestro kaj la Longviva Palaco. Sin apogante sur la monto Generalo, ĝi rigardas al Wuyang-rivero. La konstruaĵaro kun totala plankareo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj estas starigita ekde 1530 p. K. Ili harmonie dislokiĝas sur abrupte leviĝantaj krutaĵoj. Iuj el ili estas subtenataj de 3-5 dikaj kolonoj enradikitaj en la krutaĵoj, — vere admirindaj kasteloj pendantaj en la aero. La konstruaĵaroj estas interligataj per zigzagaj koridoroj. Promenante en la koridoroj, oni sentas sin kvazaŭ en fea mondo.

Zhongyuan-kaverno estas natura. Legendo diras, ke ĝi estis dormejo de taoisto, kiu faris tie senmortigajn pilolojn. Interne de la kaverno kuŝas rokoj, kiuj tre similas al lito, ombrelo kaj pakajo uzitaj de li. Poste oni konstruis tie Zhongyuan-templon, kiu dum longaj jaroj servis kiel ripozejo por antikvaj hindaj kaj birmaj budhoj dum ilia predikado en Ĉinio. La templo konsistas ĉefe el la Granda Palaco, Stelorigarda Pavilono, Sesangula Pavilono kaj aliaj. La ductaĝa Granda Palaco estas ĝia ĉefa konstruaĵo kun tegmento el verdaj glazuritaj tegoloj kaj duoblaj randoj leviĝantaj alten. Interne de ĝi la kolonoj kaj traboj estas bele gravuritaj kaj ĉarme pentritaj. La Stelorigarda Pavilono kun tri etaĝoj staras sur elstaranta konusa rokego. Se oni grimpas



La lago Gaobei

sur la plej altan etaĝon en luna nokto, oni povas aprezi tremantajn stelojn en la ĉielo kaj ĝui la belan bildon de brilantaj lamplumoj ambaŭborde de la rivero.

Antaŭ Zhongyuan-kaverno kuŝas super Wuyang-rivero impona separka ŝtonponto Zhu-sheng kun longeco de 110 metroj, larĝeco de 7 metroj kaj alteco de 12 metroj. Ĝi estas konstruita en la fino de la 14-a jarcento laŭ la ordono de Zhu Yuanzhang, la unua imperiestro de Ming-dinastio. Ĝi estis ne nur vojo kondukanta al Guizhou-provinco, sed ankaŭ ligilo inter Ĉinio kaj la suda Azio. La antikvaj birmaj senditoj al Ĉinio prenis tiun vojon senescepte. Tio estas atestita per la versaĵo, skribita sur iu turo de la ponto, kiu legiĝas jene:

“Trairas la ponton birmoj sur elefanto”.

Proksime de la ponto, staras incensilsimila klifo kun tri flankoj ĉirkaŭataj de akvo. Ĝi, kun granda supro kaj malgranda bazo, similas al giganta ŝtona incensilo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la loka registaro konstruis sur la supro de la klifo kioskon kun formo de lotusfloro, kio pli beligis la pejzaĝon.

Ascendinte la monton laŭ la vojo apud Qinglong-kavernaro kaj ĉirkaŭirinte du krutaĵojn, oni povas trovi naturan kavernon — Kavernon de Reĝo Wu. Tie estis iama stabejo de iu generalo garnizonanta en Zhenyuan. La kaverno sin trovas sur la krutaĵo 100 m. alta kaj estas grava stra-

tegia punkto por defendi la navigacian vojon de Wuyang-rivero kaj poŝtan vojon al Guizhou. Supre de la kaverno estas vasta tereno, kiu laŭdire estis trejnejo por armeanoj. Maldekstre de la kaverno staras natura gardokiosko kaj dekstre unu m. alta steleo. La kaverno estas dividita en du partojn: la antaŭa kaj la malantaŭa. La antaŭa aspektas kiel natura palaco 5 metrojn alta kaj 14 metrojn larĝa. Ambaŭflanke de la palaco pendas du grandaj stalaktitoj, unu el kiuj similas aglon sin jetantan por ĉasi nutraĵon kaj la alia birdegon kun distenditaj flugiloj.

Kvar km. for de la urbeto Zhenyuan troviĝas alia, des pli impona kaverno Tiexi. La kaverno kun totala longeco de 337 m. dividiĝas en du partojn. Ĝia plej larĝa parto estas 14 m. kaj la plej alta parto 20 m. En la kaverno koketas diversformaj stalagmitoj kaj stalaktitoj — kun la formoj de bestoj, birdoj, floroj, fiŝoj, insektoj, miniaturaj pejzaĝoj, teraskampoj kaj eĉ belaj feinoj. En la kaverna profundo brilas lageto, spegulanta la groteskajn stalaktitojn.

Marte, veturante per boato de la urbeto Zhenyuan okcidenten kontraŭ la fluo, oni estas ravitaj ĝuante la belan pejzaĝon, kie prosperas persikfloroj sur la 10-kilometraj bordoj kun siaj spegulaj bildoj en la klara akvo. La loĝantoj mjaŭ-, dung- kaj han-naciecaj konstruis en la ravino de la rivero arkan barajon altan 50 m. kaj starigis hidroelektran stacion kun kapacito de 6 400 kilovattoj, kiu lumigas milojn da familioj ĉe la bordoj. Krome la baraĵo levis la akvoni-velon de la rivero en la supra baseno je 30 m. kaj retroirigas la akvon je 25 km., tiel ke la tiea pejzaĝo fariĝis pli ĉarma.



PEJZAĜOJ DE WUYANG-RIVERO

Fotoj de XU HONGLI



La templo Zhongyuan ĉe la rivero





1 Akvokurtena Kaverno
ĉe Zhuge-montgorĝo

2 La antikva
urbo Zhenyuan

3 Plezurŝipo sur
Wuyang-rivero

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Groteska fago

de G. KAUPP (FR. Germanio)



MONATO

internacia magazino sendependa

Bedaŭrinde ne ekzistas multaj revuoj kia EL POPOLA ĈINIO, kiuj prezentas al vi interesajn artikolojn pri aliaj landoj. Sed ĉu vi jam konas la revuon, kiu raportas ne nur el unu sed el multaj landoj – ne pri la Esperanto-movado tie, sed pri politiko, ekonomio kaj kulturo?



En ĝi – kiel en EPCĈ – raportas indiĝenaj aŭtoroj kaj fakuloj el siaj landoj, ne eksterlandaj korespondantoj senditaj tien de hejmaj redakcioj. Jen vere unika revuo, en kiu vi povas legi ekskluzive en Esperanto verkitaĵojn pri ĉiuj temoj de l' hodiaŭa vivo. Apartaj rubrikoj por infanoj, junularo, turismo, kuirado, hobbio, satiro, krucenigmo, novelo ktp. Krome MONATO eldonas ĉiujare unikan poŝkalendaron, en kiu apud kalendaro kun ĉiuj naciaj festoj de l' diversaj landoj vi trovas abunde valorajn informojn tute praktikajn. Petu provkzempleron de MONATO kontraŭ du internaciaj respondkuponoj ĉe la eldonejo TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

Kiam bestoj estas malsanaj...

de **FENG YOUQIAN**

Al ĉiuj, kiuj vizitis zoologian ĝardenon, eble ne estas fremdaj tigro, elefanto, pando, pavo k.a. Tamen, ĉu vi scias, kiel oni faras diagnozon, injek-tadon, prenigon de medikamentoj kaj operacion al la malsanaj bestoj, kiuj antaŭe vivis en arbaroj kaj sur stepoj? Jen veterinaro Feng Youqian rakontas al vi, kiel li kaj liaj kolegoj plenumas siajn ordinarajn kaj interesajn laborojn.

La Red.

Antaŭ mi kuŝas san-karto, sur kiu oni skribis: Lastatempe Yingzi estas malvigla kaj malforta; la hemoglobino reduktiĝis al malpli ol kvar gramoj . . . La malsanulo estas ĉimpanzo. Mi kaj miaj kolegoj diagnozis ĝin kaj konkludis, ke ĝi malsaniĝis je stomak-intesta perturbo. Tion aŭdinte, la bredisto trankviliĝis kaj diris fingre montrante ĝian nazon: "Kia frandemulo!" La malsana Yingzi kuris en paniko ekvidinte, ke ni en blankaj kite-loj injektos al ĝi. Eĉ 4 homoj ne povis ĝin obeigi. Ni do taskis al iu flegisto akompani ĝin kaj alproksimiĝi al ĝi. Iom post iom ĝi ne plu timis nin kaj obeeme kaŭriĝis por ke ni ĝin kuracu.

En la zoo vivas pli ol 6 000 animaloj de 650 specoj el kvin kontinentoj. La zoo en la okcidenta antaŭurbo de Pekino konstruiĝis en la komenco de la 20-a jarcento. Tiutempe en ĝi estis malmultaj bestoj, kiuj servis nur por amuzi nobelojn de

Qing-dinastio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni konstruis pliajn domojn en ĝi kaj plimultiĝis la bestojn kun ĉiu jaro. Ĉiutage la zoo altiras al si milojn da turistoj.

Ĉiufoje, kiam mi vidas, ke la turistoj miras pro interesaj gestoj de la bestoj aŭ ridegas pro iliaj komikaj prezentadoj, mi tre ĝojas kaj laboras pli energie.

En la juneco mi amis precipe malgrandajn bestojn, tial mi sukcese ekzameniĝis pri bestokuraca fako. Post la diplomitiĝo mi kuracis ĉevalojn por certa tempo. En 1974 mi eklaboris en la Zoologia Ĝardeno de Pekino. Verdire, en la komenco mi ne sciis kiel kuraci tiom da bestspecoj. Ĉar la bestoj ne povas paroli, tial, por kuraci ilin, oni devas fari ekskluzive observojn kaj posedi sciojn pri interna medicino, ĥirurgio kaj ankaŭ obstetriko. Sed antaŭe mi lernis nur biologion kaj sciojn pri kortobirdoj. Sekve, mi legis koncernajn li-

brojn, konis la vivmanierojn de diversaj sovaĝbestoj, observis iliajn humorojn kaj serĉis la leĝon de ilia malsaniĝo unuflanke kaj mi konsultis spertajn veterinarojn aliflanke. Traktante ĉiun kazon, mi faris detalan noton. Kiam bestoj mortis, mi esploris la kaŭzon. Iom post iom mi ellernis rudimentan kuracarton kaj ekamis mian laboron.

Nia bestokuracejo en la sudokcidenta parto de la zoo lokiĝas en kvieta etaĝdomo en U-formo, kie estas X-radia ĉambro, laboratorio, operaciejo, apoteko, bioke-mia eksperimentejo kaj ĉambro de specimeno. Pluraj malgrandaj ĉambroj ekster la etaĝdomo servas al grave malsanaj bestoj kaj tiuj suferantaj de infektaj malsanoj. La dek veterinaroj ĉi tie laborantaj antaŭe lernis altgradan bestokuracan fakon. Ĉiu el ni prirespondas pri unu aŭ du specoj de bestoj. Nia estro Zheng Jingzhang sin okupas pri bestokuracado ekde la 50-aj jaroj kaj

havas riĉan praktikan sperton. Li kuracas karnovorajn animalojn, kiel leonoj, tigroj kaj leopardoj, kaj mi herbovorajn animalojn, kiel ĝirafoj, zebroj, sovaĝ-azenoj kaj antilopoj. Ĉiutage mi rigardas bestokusejojn kaj demandas bredistojn pri la vivo de bestoj. Se mi rimarkas ion eksterordinaran ĉe bestoj, mi tuj ekzamenas ilin. Mi kuracas malsanetajn bestojn ĉe la loko kaj grave malsanajn en la bestokuracejo. Por esplori ilian malsanon, palpante kaj frapante ilin, ni faras al ili laŭtajn vokojn kiel ordonojn. Eble pro tio, ke ili min vidas ĉiutage, ili ŝajne konas min. Tial, ekvidinte min, iuj el ili fiksas sian rigardon sur mi kaj ĝirafoj eĉ iras al mi.


Kvankam tiuj bestoj estas sovaĝaj, tamen se oni ne bone ilin prizorgas, ili facile malsaniĝas. Ofte okazas, ke en vintro kaj printempo ili tudas aŭ febras kaj somere ili suferas de disenterio, pneŭmonito aŭ anemio. Koninte bone tiun leĝon, ni laŭeble alprenas iujn preventajn rimedojn por ilia sano. La veterinaroj ne nur kuracas la bestojn, sed ankaŭ prenas sur sin laboron multigi ilin. Ĉiu veterinaro devas klare scii, kiam gravediĝis kaj kiam akuŝos la bestoj, kiujn li prizorgas. Antaŭ ilia nasko li devas pli atente ilin prizorgi. Foje iu nilgaj-o (speco de antilopo) suferis doloregon antaŭ malfacila akuŝo, mi do ĝustatempe faris al ĝi cezaran operacion kaj elprenis la feton, tiel mi savis la patrinon kaj idon el danĝero.

Por kuraci bestojn estas necese, ke pluraj veterinaroj harmonie kunlaboru. Precipe kiam ni faras ĝeneralan ekzamenon al la bestoj, preskaŭ ĉiuj veterinaroj de la bestokuracejo partoprenas en la laboro. Pli malfacile estas ilin kapti. Al malsamaj bestoj ni aplikas malsamajn rimedojn —

aŭ per manoj, aŭ per instrumentoj, aŭ per anesteziino. Ni ne sendistinge uzas devigan rimedon. Ekzemple, kiam ni pretis injekti al furioza elefanto pezanta tunojn, ni laŭeble deturnis ĝian atenton per tamburado, tamtamado kaj bruligo de fajro. Ĉe ĝia senatento ni enbatis la pinglon en ĝian karnon per martelo. Por tio ni ĉiufoje elspezis preskaŭ 2 horojn kaj ege laciĝis.

La bestoj ne komprenas la veron “maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango”. Ni devas elpensi diversajn rimedojn, por ke la bestoj prenu medikamenton. Mi ofte observas ĝirafon kaj scias, ke ĝi ŝatas manĝi dolĉajn kaj acidajn kratag-fruktajn pilolojn. Tial, ni enmetas alian medikamenton en ĝin, por ke la ĝirafino englutu ilin kune. Same ni enmetas medikamenton en vianĉon por manĝigi leonon kaj tigron.

Oni diras, ke veterinaro estas fleganto kaj vartanto de bestoj. Vere, kiam rara besto suferas de



Ekzameno antaŭ operacio

malsano, veterinaroj flegas ĝin tage kaj nokte. En ferioj kaj festotagoj, se nur mi informiĝis, ke bestoj malsaniĝis, mi tuj rapidis al la zoo. Tutjare ni tre malofte pasigis plenajn libertagojn. Iam mi longe restis en la hejmo, sentis maltrankvilon kaj nepre volis iri al la zoo por rigardi la bestojn. Kvankam nia laboro estas malpura kaj laciga, tamen, kiam ni resanigis la malsanajn bestojn kaj vidis ilin revigliĝi antaŭ la turistoj, ni ekĝuis grandan plezuron neakireblan por la aliaj.

Feng Youqian (la dua de dekstre) injektas al sovaĝa azeno kune kun siaj kolegoj.



EN la frua printempo mi revenis de Pekino al mia hejmvilaĝo por viziti miajn parencojn, kiujn mi forlasis antaŭ pli ol 10 jaroj. Vidinte grandan ŝanĝon de la loko, mi emociiĝis kaj longe ne povis kvietigi min. La vizito al Shuanghe-mezlernejo neforgeseble impresis min.

La lernejo kun 500 lernantoj lokiĝas en montaro. Mia amiko diris, ke ĝi estas fama en la loko pro tio, ke ĝi partoprenigas siajn lernantojn en fizika laboro. Tial iutage mi kun mia amiko vizitis ĝin. Post unuhora veturado per aŭto laŭ montvojo ni atingis la lernejon. Ĝi sin trovas ĉe la piedo de Daba-montaro en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Ĉirkaŭ ĝi staras unutonaj montoj. Krom sportejo troviĝas neniu granda ebenejo en la lerneja korto. Antaŭ la lernejo fluas rivereto. Trans la akvo etendiĝas asfaltita vojo serpentanta en Daba-montaro. Sur la vojo oni povas vidi la klasĉambrojn, oficejojn kaj instruistajn loĝdomojn sin kaŝantajn inter verdaj arboj sur montodeklivo.

Nin akceptis lernejestro He Guogu. Li, maldika kaj alta, kun iom grizaj haroj aĝas ĉirkaŭ 50 jarojn. Li en nigra pelta jako aspektis kiel laboristo. Li tre ŝatas florojn. Sub lia iniciato la instruistoj kaj lernantoj ĉie plantis florojn kaj kovris la kalvan montodeklivon per verdaj arboj.

Akompanate de He, ni vizitis la lernejon. Li montris al ni tiajn kaj ĉi tiajn florojn kaj arbojn, kiujn li plantis. Sur la montodeklivo ridas diversaj floroj. Tie prosperas ankaŭ japanaj sakuroj kaj koreaj hibiskoj. Inter florbedoj kreskas vinberujoj kaj ŝprucas fontanoj. En la plej alta loko de la lernejo kuŝas fruktoĝardeno kun oranĝujoj kiel ĉefaj frukt-

HOU JUELIANG:

Ili propramane bonigis sian lernomedion

— VIZITO AL SHUANGHE-MEZLERNEJO EN
MONTREGIONO DE SICHUAN-PROVINCO

arboj. Sed bedaŭrinde, mi ne vidis oranĝojn pendantajn sur la arboj pro mia malfruiĝo. Najbare de la fruktoĝardeno troviĝas botanika ĝardeno kun ĉirkaŭ 40 specoj de bambuoj kaj arboj. Ĝi servas kiel tereno por lerni botanikon. La fruktoĝardeno kaj botanika ĝardeno, kiujn kreis la instruistoj kaj lernantoj mem, ne nur beligis la medion sed ankaŭ servis al la instruado.

Post pririgardado al la korto ni venis en la oficejon de la lernejestro. Pro la malalta temperaturo en la montregiono oni ankorau hejtis fornon. Sidante ĉirkaŭ la forno, ni aŭskultis la rakonton fare de la lernejestro. Li diris, ke la lernejo travivis 25 jarojn. Antaŭe tie troviĝis neniu mezlernejo. Post kiam geknaboj finis sian lernadon en elementa lernejo, nur malmultaj el ili povis viziti mezlernejon en la gubernia urbo, dum granda parto el ili restis en la vilaĝo por labori. Post la fondiĝo de Shuanghe-mezlernejo preskaŭ ĉiuj geknaboj tiaj povas viziti ĝin je malalta kosto.

Pro sia vilaĝa karaktero, ĉiujare la lernejo ricevis de la ŝtato nur malmulte da monsumo por la eduka afero. Ankaŭ ĝiaj kondiĉoj estas tre malbonaj pro ĝia situo. Same kiel aliaj vilaĝaj lernejoj, ĝi dum longa tempo ne povis solvi la problemon de trink-

akvo kaj elektro. Tiam ĉiu dua da lernantoj uzis unu olelampon; kaj oni devis porti akvon de la montpiedo kaj surdorse porti rizon el aliaj lokoj. Pro la malbonaj kondiĉoj, iuj instruistoj ne volis daŭre labori tie opiniante, ke tiaj kondiĉoj malfavoraj al eduko ne taŭgas por elkulturi altkvalitajn lernantojn, kaj ankaŭ nombro da lernantoj ne volis lerni diligente.

Kiel bonigi la kondiĉojn? La demando pensigis la instruistojn kaj lernantojn. Fine ili ekpraktikis sistemon de parta laborado kaj parta lernado.

Por konstrui fervojon proksime de la lernejo, oni bezonis multege da gruzoj. Tiam la lernejo organizis la instruistojn kaj lernantojn dispecigi ŝtonojn, kontraŭ kiuj ili ricevis 1 800 juanojn. Per la mono la lernejo aĉetis dizelon, pruntis muelmaŝinon de proksima agrikulturila stacio kaj fondis muelejon por prilabori grenon por lokaj kamparanoj. Post du-jara servado la lernejo aĉetis malgrandan generatoron por produkti elektron. De tiam la uzado de keroseno fariĝis pasintaĵo. La lernejo liveris elektron ankaŭ al proksima urbeto. Poste ĝi aĉetis akvopumpilon kaj kaldronegon kaj konstruis banejon por la instruistoj kaj lernantoj. La banejo servas ankaŭ al la loĝantoj. La lernejo aĉetis trakto-



ron, kiu liberigis la lernantojn de surdorsa portado de rizo. Por pliigi sian enspezon, la lernejo ofte per la traktoro transportas varojn por iuj unuoj.

En valo, je 10 kilometroj sudokcidente de la lernejo, la instruistoj kaj lernantoj fondis kultivejon kun 7 hektaroj da agroj. En la kultivejo troviĝas 7-8 fontoj, kies akvon oni utiligas por irigacii rizkampojn kaj bredi fiŝojn. Ĉiujare la kultivejo produktas pli ol 13 000 kilogramojn da greno. La loka registaro alvokis planti aleŭritojn. Tial la kultivejo plantis 3 600 junajn aleŭritojn, kiuj kreskas prospere. La lernejestro diris, ke en la tempo, kiam la aleŭritoj floras, la kultivejo fariĝas mondo de floroj. La aleŭritaj semoj estas valoraj oledonaj semoj por eksporto. Laŭ takso, post 5 jaroj, la kultivejo rikoltos 20 tunojn da aleŭritaj semoj ĉiujare.

La lernejestro daŭrigis, ke la instruistoj kaj lernantoj mem faris 120 pupitrojn, pli ol 100 seĝojn, 25 skribotablojn, 120 benkojn kaj 16 laboratoriajn tablojn. La lernejo ankaŭ aĉetis pliajn instalaĵojn por instruado. Ĉar la lernejo longtempe persistis en la enspeziga laborado, bonstatigaj instalaĵoj rimarkinde plimultiĝis. La lernejo aĉetis koloran televidilon, altklasan diktafonon, elektrajn ventumilojn kaj novtipajn elektrajn lampojn kaj starigis



He Guogu

amuzejon. Krome, la lernejo uzis parton de la enspezo por premii bonajn lernantojn kaj eminentajn instruistojn.

La lernejestro diris, ke unu el la grandaj sukcesoj estas, ke tia laborado ŝanĝis la ideologion de la lernantoj, igis ilin laboremaj kaj havigis al ili amon por laboruloj.

“Ĉu tia laborado malhelpas la lernadon?” mi demandis. “Ne. Grave estas bone aranĝi,” li respondis. Li konigis al mi ilian konkretan aranĝon. Ili laborigas la lernantojn en la kultivejo maksimume 13 sinsekvajn tagojn ĉiusemestre. Tial la lernado kaj laborado ne malhelpas unu la alian. La infanaĝaj lernantoj povas ne fari pezan laboron. La kultivejon mastrumas kelkaj laboristoj senditaj de la lernejo kaj la lernantoj laboras tie nur en aferoplena sezono.

Ĝenerale, lernantoj el vilaĝoj ne posedas solidajn fundamen-

tajn sciojn. Kaj instruado al ili estas tre peniga. Tamen la lernejo akiris bonan sukceson en instruado kaj enviciĝis inter la avangardaj vilaĝaj mezlernejoj en la gubernio. En 1981, ĝiaj abiturientoj, kiuj eniris en altlernejojn post ekzameno, estas nur malpli multaj ol tiuj de la du ĉefaj mezlernejoj de la gubernio.


Ĉe mia adiaŭo al la bela montvilaĝa mezlernejo, la lernejestro kun profunda sento donacis al mi kelkajn oleandrojn. Mi ŝatas la ruĝajn oleandrajn florojn kaj des pli la diligentajn instruistojn kaj lernantojn, kiuj tapiŝis la monton per verdaĵo. Mi deziras al ili pli grandan progreson.




Unua ekzerco




Dua ekzerco




Tria ekzerco



Kvara ekzerco



Kvina ekzerco



20 SANPROTEKTA

LA gimnastiko “20 Sanprotektaj Ekzercoj” estas kreita de s-ro Wang Ziping, fama ĉin-medicina kuracisto kaj ĉina luktoartisto. En ĝin li enkondukis la tradicion ĉinan luktoarton kaj *ĉigon-on**. La ekzercoj estas simplaj kaj utilaj por preventi kaj kuraci lumban kaj gamban doloron, afekciojn de nukaj vertebroj, perihumerskapoliton, genuartriton, koronarian kormal-sanon, hipertension, gastroenteriton, neŭrastenion kaj maljunulan kronikan trakeiton. La pacientoj povas fari la ekzercojn, dum ilia prenado de medikamentoj aŭ post ĉeso de medikamentopreno por daŭrigi la kurac-efikon kaj fortigi la sanon. La ekzercoj estas taŭgaj por la mezaĝuloj kaj maljunuloj, kaj ankaŭ por sciencistoj, teknikistoj kaj ŝtatoficistoj. Ni prezentos ilin al niaj

legantoj ĉi-sube kaj en la venonta numero.

UNUA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la piedoj disigitaj tiom larĝe, kiom la ŝultroj etendiĝas. Meti la maldekstran manon sur la dekstran kaj surventrigi ilin, kun la manplatoj internen.

Farado: Ĉiu movo de la ekzercoj devas esti farata 6-36-foje. 1. Malrapide fari longan enspiron. 2. Malrapide fari elspiron. Fari spirojn naturajn kaj profundajn, laŭeble per la diafragmo. Dum la ekzercado malstreĉi la korpon, teni la kapon vertikala, nature fermi la okulojn, milde leki la palaton kaj liberigi la menson de ĉiaj pensoj.

EKZERCOJ (1)

DUA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la piedoj disigitaj kaj la brakoj mallevitaj ambaŭflanke de la femuroj.

Farado: 1. Kurbigi kaj levi la brakojn, kun la manplatoj turnitaj malsupren kaj alniveligitaj al la antaŭbrakoj, ĝis antaŭ la brusto ĉe la sama nivelo kiel la ŝultroj. 2. Forte malsuprenigi la manojn ĝis la vertikala pozicio de la brakoj. Fari malrapide la movojn dum la ekzercado, fari naturan enspiron dum la levo de la brakoj kaj naturan elspiron dum la mallevo, neniam inverse. Streĉi la ŝultrojn dum la levo de la brakoj kaj laŭeble malstreĉi ilin dum la forta mallevo de la manoj.

TRIA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la disigitaj piedoj, meti la maldekstran manon sur la dekstran kaj surbrustigi ilin, kun la manplatoj turnitaj internen.

Farado: 1. Cirkle masaĝi per la manoj, de maldekstre dekstren, la bruston kaj la supran parton de la abdomeno. 2. Cirkle masaĝi en inversa direkto la bruston kaj la supran parton de la abdomeno. 3. Fari la saman masaĝon al la ventro kun la umbiliko kiel la centro. Fari unu cirklan masaĝon ĉe ĉiu spiro, kun iom levitaj kapo kaj okuloj kaj rektigita supra parto de la korpo.

KVARA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la disigitaj piedoj, levi la manojn horizontale antaŭ la okulojn, kun la manplatoj turnitaj eksteren, la fingroj iom fleksitaj kaj la brakoj direktitaj iom oblikve antaŭen.

Farado: 1. Movi la manojn samtempe dekstren kaj maldekstren, iom post iom loze pugnigi la manojn, iom post iom vertikala-


ligi la antaŭbrakojn kaj laŭeble elstarigi la bruston. 2. Fleksi la brakojn kaj malpugnigi la manojn ĝis plateco, dume fari enspiron kaj paralele etendi la brakojn, sen malsupreniĝo. Iom streĉi la ŝultrojn kaj la manojn, malrapide kaj iom post iom malantaŭenigi la brakojn por elstarigi la bruston kaj streĉi la skapolojn.

KVINA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la piedoj disigitaj tiom larĝe, kiom la ŝultroj etendiĝas, fleksi la brakojn, kun la manoj loze pugnigitaj antaŭ la brusto kaj teni ilin samnivele kiel la ŝultroj.

Farado: 1. Iom post iom malpugnigi la manojn, kun la manplatoj supren, milde levi la brakojn kaj sekvi la levitajn manojn per la okuloj. 2. Iom post iom mallevi la manojn, dume iom post iom loze pugnigi la manojn kaj iom streĉi la fingrojn por repreni la komenca teniĝon. Fari enspiron dum la levo de la brakoj kaj elspiron dum la mallevo.


Sesa ekzerco



Sepa ekzerco



Oka ekzerco



SESA EKZERCO

Komenca teniĝo: Same kiel tiu de la dua ekzerco.

Farado: 1. Fleksi la maldekstran brakon kaj samtempe levi ĝin ĝis super la kapo kun la maldekstra manplato eksteren kaj poste laŭeble supren kvazaŭ tenanta ion, sekvi la levitan manon per la okuloj kaj iom levi la kalkanojn. Samtempe kun tio, fleksi la dekstran brakon kaj samtempe levi ĝin malantaŭ la korpo ĝistalie, kun la manplato malantaŭen. 2. Arke movi la maldekstran manon maldekstren de super la kapo, post la plena mallevo de la maldekstra brako refleksi kaj levi la brakon malantaŭ la korpo ĝistalie, kun la manplato malantaŭen. Samtempe kun tio, mallevi la dekstran manon, post la plena mallevo refleksi kaj levi la brakon antaŭ la korpo ĝis super la kapo, kun la manplato supren. Fari enspiron dum la levo de la brakoj kaj elspiron dum la mallevo.

SEPA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la disigitaj piedoj kun la manoj sur la koksoj.

Farado: 1. Etendi la kolon antaŭen, turni ĝin malsupren kaj maldekstren kaj rigardi lokon

ĉirkaŭ du metrojn malsupren antaŭ la korpo. 2. Repreni la komenca teniĝon. 3. Etendi la kolon antaŭen, turni ĝin malsupren kaj dekstren kaj rigardi malsupren antaŭ la korpo. 4. Repreni la komenca teniĝon. Fari enspiron dum la turnado de la kolo kaj elspiron dum la reprenado de la komenca teniĝo.

OKA EKZERCO

Komenca teniĝo: Same kiel tiu de la sepa ekzerco.

Farado: 1. Turni la kolon laŭeble supren, maldekstren kaj malantaŭen kaj rigardi maldekstren kaj malantaŭen. 2. Repreni la komenca teniĝon. 3. Turni la kolon supren, dekstren kaj malantaŭen kaj rigardi dekstren kaj malantaŭen. 4. Repreni la komenca teniĝon. Fari enspiron dum la turnado de la kolo kaj elspiron dum la reprenado de la komenca teniĝo. Fari la turnadon malrapide, iom forte, kun la talio kaj la supra parto de la korpo ne movitaj kaj la mentono retirita.

NAŬA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la piedoj disigitaj iom pli larĝe, ol kiom la ŝultroj etendiĝas. Unue froti la manplatojn kaj la mandorsojn kaj poste meti la

manojn sur la koksojn, kun la dikfingroj antaŭe.

Farado: 1. Forte masaĝi per la manoj la lumbon ĝis la postajo. 2. Rotacie turni la talion de maldekstre malantaŭen, dekstren kaj antaŭen. Rotacie turni la talion en inversa direkto. Dum la turnado teni la gambojn kaj la supran parton de la korpo ĉiam rektaj kaj la talioturnadon pli kaj pli larĝa.

DEKA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari sur la piedoj disigitaj iom pli larĝe, ol kiom la ŝultroj etendiĝas. Teni la brakojn nature mallevitaj.

Farado: 1. Turni la korpon maldekstren, puŝi la dekstran manplaton antaŭen kun la fingroj supren kaj alniveligi la dekstran brakon al la ŝultroj. Pugnigi la maldekstran manon, tiri ĝin al la maldekstra flanko de la talio, turni la kapon malantaŭen kaj rigardi maldekstren kaj malantaŭen. 2. Turni la korpon dekstren, puŝi la maldekstran manplaton antaŭen kun la fingroj supren, alniveligi la maldekstran brakon al la ŝultroj, rektigi la manplaton. Pugnigi la dekstran manon, retiri ĝin al la dekstra flanko de la talio kaj rigardi dekstren kaj malantaŭen. Fari enspiron dum la puŝo de la manoj kaj elspiron returne. Malrapide fari la movojn. Iom streĉi la pojnojn kaj teni la gambojn senmovaj kaj la brakojn nerigidaj.

Ĉigon-o estas originala sanprotekta arto el la ĉin-medicina heredaĵo, per kiu oni povas sin ekzerci fizike kaj spirite por preventi kaj kuraci malsanojn kaj plifortigi la sanon. En la antikva Ĉinio ĝi estis nomata ankaŭ "arto por forigi malsanojn kaj longigi la vivon".

Naŭa ekzerco

Deka ekzerco





Antaŭ Tian'anmen- pordego

Fotoj de LI CHUNGENG

Lastatempe la pekina magistrato, laŭ la propono de la popolamaso kaj specialistoj, malkonstruis la spektejojn antaŭ Tian'anmen-pordego kaj anstataŭigis ilin per florbedoj. Oni ankaŭ dragis la Jadan Riveron antaŭ la pordego kaj riparis ĝiajn balustradojn. Nun la riverakvo fariĝis klara kaj Tian'anmen-pordego kun floroj kaj arboj antaŭ si fariĝis pli bela.


Tian'anmen-placo estas loko ŝatata de la ĉina popolo. Oni iras tien por promeni aŭ foti sin.

Movoplena placo





Verdigita zono antaŭ la pordego



Matena legado




Malgranda infano sur la placo



Volana ludo



Infanoj sub la gvido de infanĝardenistinoj promenas sur la placo.



Flugigo de kajtoj sur la placo



Granda draka kajto antaŭ flugigo

2 400 ĈINAJ INDUSTRIAJ ENTREPRENOJ RENOVIGATAJ

Nun en Ĉinio 2 400 industriaj entreprenoj komencis sian teknikan renovigon. Inter ili 709 estas taskitaj al bonkvalitigo de siaj produktajtoj, 563 al plimultigo de specoj de siaj produktajtoj kaj 802 al pligrandigo de reproduktado dank' al apliko de novaj teknologioj, instalajtoj kaj materialoj.

La teknika renovigo estas unu el la gravaj rimedoj por transformi ĉinajn entreprenojn kaj levi ilian ekonomian efikon. Post plenumiĝo de la renovigo ĉiujare ili kreskigos la produktovaloron je pli ol 2.6 miliardoj da juanoj, gajnos pli ol 500 milionojn da juanoj da profito kaj donos al la ŝtato pli ol 150 milionojn da juanoj da imposto, ŝparante energi-kvanton egalan al pli ol 1.8 milionoj da tunoj da norma karbo.

FUNKCIOS 12 PROFUNDAJ ĈEDOKAJ ANKREJOJ

12 profundaj ĉedokaj ankrejoj estos ekuzitaj ĉi-jare, dank' al kio la ŝarĝokapablo pligrandiĝos je 20 milionoj da tunoj.

La ankrejoj plejparte estas lokitaj ĉe la marhavenoj. Inter ili dek unu estas destinitaj por akcepti ŝipojn de kapacito super dekmil toneloj. Nun estas jam uzataj du ankrejoj por kontenerŝipoj en la haveno Ŝanhajo, du ankrejoj en la haveno Dongdu de Xiamen, Fujian-provinco, kaj unu ankrejo por kontenerŝipoj en la haveno Huangpu, Guangdong-provinco.

OK KARBOMINEJOJ STREĈE KONSTRUATAJ

Nun ok gravaj karbominejoj estas streĉe konstruataj en la provincoj

Shanxi, Shandong, Henan, Liaoning kaj Anhui kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Nun 24 ŝaktoj estas konstruataj en la supre menciitaj minejoj. Ĉi-jare la planita borkvanto pligrandiĝis kaj la rapideco de borado leviĝis je 24% kompare kun tiu en la pasinta jaro. Antaŭ la fino de aprilo oni jam plenumis kvaronon de la jara plano. Videble 1983 fariĝos rekorda jaro.

La 24 ŝaktoj havas produktan povon de 50 milionoj da tunoj da karbo kaj post efektiviĝo de la plano la produktopovo duobliĝos, kio mildigos la streĉecon de energio en Ŝanhajo, orientaj provincoj kaj Liaoning-provinco.

PORENERGIAJ KONSTRUOJ EN LA ĈINA KAMPARO

Por solvi la problemon pri energio en la kamparo, la Ĉina Akademio de Sciencoj efektivas 10 projektojn de scienca-teknika esplorado, kiuj donos efikon iom poste al la praktika vivo.

Ili inkluzivas konstruadon de ses eksperimentaj vilaĝoj, aplikon de novaj metodoj de metano-produktado kaj esploron de teknologio de rapid-kreskaj arboj por brulligno, energi-ŝparaj fornoj, novaj materialoj por utiligi la sunan energion, sistemo de elektro-produktado per vento, energi-rezerva teknologio kaj sensaligo de marakvo per sunenergio.

Rilate la eksperimentajn vilaĝojn oni ekkonstruis iujn el ili jam antaŭ 2-3 jaroj. La sukcesan atingon en sciencateknika esplorado oni etendos al la kamparo. Por konstrui la ceterajn, la lokaj kamparanoj devas mem kolekti monon, dum la akademio faros intelektan investon. Ili ĉiuj estas konstruataj por interkompletigo kaj sinteza utiligo en la malsamaj kondiĉoj naturaj kaj ekonomiaj.

ĈINAJ DOKTOROJ KAJ MAGISTROJ NOVE NOMUMITAJ


Ekde 1980, kiam Ĉinio starigis la universitatajn rangojn, doktoriĝis 18 personoj, magistriĝis ĉ. 15 000 kaj pli ol 320 000 fariĝis licenciuloj. Nun en la ĉinaj universitatoj proksimume mil personoj studas por doktoreco, dum pli ol 20 mil por magistreco.

La juĝa komitato konsistanta el membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj diris, ke la 18 doktoroj havas solidan fundamentan teorion kaj sistemajn fakajn sciojn kaj kapablas sendepende fari scian esploron per modernaj rimedoj surbaze de la studita teorio. Kreivaj, ili rikoltis fruktojn en la esplorado.

ĈINAJ TABLOTENISISTOJ GAJNIS SES MONDAJN ĈAMPIONECOJN

La 37-a Monda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso iris en Tokio en la fino de aprilo kaj la unua tagdeko de majo. En la sep disciplinoj la ĉinaj gesportistoj gajnis ses ĉampionecojn, kvar duajn lokojn kaj naŭ triajn lokojn (parelele).

Ĉinio gajnis la teamajn ĉampionecojn viran kaj virinan. Ĉina tablotenisisto Guo Yuehua gajnis la ĉampionecon de vira solludo kaj ĉina sportistino Cao Yanhua la ĉampionecon de virina solludo. Krome la ĉinaj sportistoj gajnis ankaŭ la ĉampionecojn de virina parludo kaj gea parludo. Jugoslavaj tablotenisistoj gajnis la ĉampionecon de vira parludo.





*Ĉinaj violonistoj premiitaj en la konkurso de violonludo (de dekstre):
Wang Xiaodong, Wang Zhengrong, Zhang Le kaj He Hongying*

ZHANG MO:

Tri malgrandaj violonistoj

LA Unua Internacia Menuhin-konkurso de Violonludo estis iranta en teatro de Folkestone en la suda parto de Britio. Kiam la juĝantoj estis farantaj notojn al la ĵus ludinta knabo-violonisto, iu elsorĉis mirigan G-minoran sonaton de la fama itala komponisto Tartini. Hungara juĝanto grumbliis: "Kial nun enpuŝiĝas junulo-konkuranto?" Li levis la kapon je sia grumblo kaj vidis ke sur la scenejo ludas dika orient-

landa knabo. Li estis 13-jara ĉina violonisto Wang Xiaodong. Kiam li faris la lastan tiron de la arĉo, aplaŭdis la juĝantoj, eĉ tre diskretaj. La deĵoranta prezidanto de la juĝantaro s-ro Robert humure diris al la ĉina juĝanto Wu Zuqiang: "Mi esperus, ke neniu alia ĉina konkuranto ludos pli bone ol li, ĉar mi jam donis al li plej altan noton."

Kiel rezulto de la konkurso, Wang Xiaodong gajnis la unuan

lokono, 15-jara ĉina knabino Wang Zhengrong la duan, Zhang Le la trian, kaj Lü Siqing la kvinan. En la finalo de junuloj-konkurantoj 16-jara ĉina violonisto He Hongying gajnis la kvaran lokono, Chen Lilun el Taiwan, Ĉinio, gajnis la unuan lokono; la duan kaj trian lokojn gajnis nederlanda kaj brita konkurantoj.

En la konkurso okazinta de la 2-a ĝis la 10-a de aprilo parto-

prenis ĉ. 50 violonistoj el 19 landoj kaj regionoj inkluzive Brition, Usonon, Aŭstrion, FR Germanion, Rumanion, Pollandon kaj Ĉinion. La granda internacia muzika konkurso altiris al si grandan atenton de la diverslandaj muzikistoj. La sukcesa ludo de ĉinaj junuloj kaj knaboj estis alte taksata de multaj personoj. Oni laŭdis ilian ludon rafinita kaj riĉa je esprimo. Iuj opiniis ke estas malfacile kredi, ke tiel malgrandaj knaboj povis profunde koni tiujn malfacilajn muzikopecojn kaj ludis ilin tiel brile.

Wang Xiaodong naskiĝis en violonista familio. Lia patro estas la unua violonisto de la Ŝanhaja Baleta Trupo kaj la patrino estas violonisto en la orkestro de la Ŝanhaja Filmstudio. Liaj gepatroj komencis instrui lin ludi violonon jam de lia aĝo de 5 jaroj. Komence li ne ŝatis tian "ludon". Vidante la kamaradetojn gaje ludantaj diversajn interesajn ludojn, li sentis la violonludon enuiga. Sed fine lin sorĉis violono. Kiam li aŭdis la ludojn de la verkoj de Dvorak, Mendelssohn, Paganini k.a., lin iom post iom infektis la violonaj melodioj jen lirikaj, jen rapidaj, jen softaj, jen inspiraj. Wang Xiaodong, naturdotita per forta komprenemo, tute ebriiĝis de esprimriĉa violonludado.

La favoraj familiaj kondiĉoj, la eksterordinara muzika talento, la konsciencia instruisto kaj precipe lia diligenteco faris lin distingiga violonisto. Ekzercado estis peniga, precipe por infano. Longdaŭra ekzercado en unu sama pozo ofte rigidigis liajn brakojn kaj kolon.

En la aĝo de 10 jaroj Wang Xiaodong estis akceptita en la Elementan Lernejon sub la Ŝan-

haja Konservatorio kaj ricevis regulan trejnadon. Tiam li jam povis bone ludi muzikopecojn de mondfamaj komponistoj. Kiam li estis 11-jara, la Ŝanhaja Filharmonia Orkestro konsentis akompani lian solon de E-minora violona konĉerto de Mendelssohn. En la sama jaro, la Junula Filharmonia Orkestro de San-Diego de Usono vizitis Ĉinion kaj havis lian kunlaboron en la turneo en Pekino, Ŝanhajo, Hangzhou kaj Kantono. En la aĝo de 12 jaroj, li faris viziton al Usono kiel membro de la muzikista grupo de la Ŝanhaja Konservatorio kaj faris tie 57 prezentadojn.

En la konkurso Wang Zhengrong kaj Zhang Le ludis tre malfacilajn muzikopecojn. La ludo de Wang Zhengrong karakteriziĝis per milda kaj klara tembro, rafinita tekniko kaj delikata esprimo. Same kiel Wang Xiaodong kaj Zhang Le, ŝia sukceso estis nedisigebla de ŝia genio, pensemo, diligenta ekzercado kaj fervora direktado de la instruisto. Ekde la aĝo de 6 jaroj ŝi estis direktata de sia unua instruisto. Post eniro en la mezlernejon sub la Centra Konservatorio, ŝi tuj ricevis apartan prizorgon de instruisto. Antaŭ la konkurso, ŝia instruisto projektis por ŝi plej racian planon de trejnado; la lernejo plurfoje aranĝis por ŝi publikan prezentadon, kaj cetere ŝi ricevis personan direktadon de Menuhin. En la violona konkurso por tutlandaj muzikaj lernejoj en 1981 ŝi gajnis la duan premion de la knaba grupo.

Zhang Le estas kunlernanto de Wang Xiaodong. Lia patro estas violonisto en la Ŝanhaja Filharmonia Orkestro. Li eklernis violonludon en la aĝo de 5 jaroj direktate de sia patro. Li ekzercis sin tre diligente. Nokte, por ne

ĝeni siajn gepatrojn, li fermis sin en necesejo por ekzerci.

Je lia eniro en la lernejon lia instruisto jam rimarkis la superecon kaj mankon en lia ludo. Por elimini liajn mankojn la instruisto emfazis al li rigoran trejnadon de fundamentaj teknikoj, dum Zhang faris grandan klopodon kaj fine havigis al si firman bazon.

Zhang Le havas tre bonan prezentan temperamenton. Lia ludo estas klara kaj laŭta kaj lia arĉotirado estas kuraĝa kaj plene entuziasma. Dum ludado li ĉiam estas absorbita kaj povas sin teni longe en stabila stato. En la konkurso de junuloj kaj knaboj de tutlandaj muzikaj lernejoj de 1981, li gajnis la unuan lokon de la knaba grupo.

Wang Xiaodong, Wang Zhengrong kaj Zhang Le estas la duaj kiuj honoris la patrolandon per siaj sukcesoj en internacia konkurso de violonludo. La unua estis Hu Kun, gajninto de la kvina loko en la Kvara Internacia Sibelius-konkurso de Violonludo okazinta en Finnlando. Kiam ili estis gratulataj per florbukedoj kaj estis demanditaj, Wang Xiaodong multe ĝeniĝis de tio kaj ne povis diri eĉ unu vorton. Li ja estas knabo. Lia instruisto diris al la demandanto kun bedaŭro: "Eble li esprimas sin per violono pli bone ol per la buŝo."



Han Qi :

Knabino vendanta ventumilojn

(NOVELO)

Ilustrita de Yin Fengge

LA susuranta pluveto jen lan-
tiĝis, jen hastis. Malvarma
vento puŝiĝis domen knarigante
la pardonon, kaj flirte movis paper-
pecetojn sur la planko. En la
atendejo estis tiel mallume, ke
oni eĉ ne povis klare vidi la vi-
zaĝon de homoj sidantaj dek
paŝojn malproksime.

“Ventumilojn, aĉetu ventumi-
lojn!”

La voĉo estas tiel klara, kva-
zaŭ iu plukus kordojn.

La kolportanto estis knabino
8-9-jara, nudpieda. Ŝi havis mal-
dikajn brovojn, brilantajn pupi-
lojn kaj mallongan nigran hara-
ron, ŝiaj orkoloraj orelingoj ba-
lanciĝis takte je ŝia paŝado. Ŝi
portis bluzon el ruĝa kordurojo
kun nigraj punktoj, kovritan per
plasta membrano, sur kiu akvo-
makuloj rebrilis. Ŝi iom retiris la
ŝultrojn, kvazaŭ sentus malvar-
mon. Ŝi rigardis la pasaĝerojn,
kvazaŭ petus, ke oni aĉetu ven-
tumilojn.

Mi venigis ŝin.

En ŝia korbo estis dek unu fal-
deblaj ventumiloj maldelicate

faritaj. Sur ĉiu ventumilo estis
kelke da lotusfolioj kaj du hel-
ruĝaj floroj. La vejnoj de la fo-
lio kaj petaloj estas atente de-
segnitaj. Kvankam la bildoj ne
estis faritaj de famaj pentristoj,
tamen havis apartan guston de
modesteco.

“Kiom kostas?”

“Dek cendojn,” ŝi diris mal-
kuraĝe.

“Kio? Dek cendojn?” mi fose-
tadis en ŝia korbo kaj marĉandis
intencante profiti el ŝia juneco.
“Ĉu tia ventumilo kostas dek
cendojn? . . . Se kvin cendojn
kontraŭ unu, mi aĉetos kvar. Ĉu
bone?”

La knabineto kapskuis malku-
raĝe.

Tiumomente alproksimiĝis for-
tika junulo:

“Kial ne? Vendu je la prezo!”

Li sencele fosadis en la korbo
jen per la dekstra mano, jen per
la maldekstra. La ventumiloj
senordiĝis en la korbo. Subite mi
vidis, ke li kaŝis du ventumilojn
en sian manikon. Pro la surprizo

mi fikse rigardis lin, sed li mon-
tris sin aplomba kaj senzorge
ridetis al mi, kvazaŭ al sia kom-
plico. Mi ektimiĝis kaj ruĝiĝis,
kvazaŭ la spirado estis sufokita.
Ankaŭ mia koro kuntiriĝis kaj la
gamboj ekstremsis.


“Ĉu tia aĵo kostas dek cen-
dojn? Mi ne volas!” La junulo
retiris sian manon kaj tiam en la
korbo restis nur 9 ventumiloj.

Mi senmove rigardis la korbon.
Subite la knabineto turnis la ri-
gardon al mi kaj krias, fingre
montrante la junulon: “Vi estas
ŝtelisto!”

“Kion?” rikanis la junulo al-
proksimiĝante al la knabineto,
pinĉis ŝian vangon kaj demandis:
“Diru, kiu estas ŝtelisto?”

Mi leviĝis ekstremane. “Lasu,
lasu,” mi deprenis lian manon de
sur ŝia vango kaj ridete diris:
“Ŝi estas tro juna, eble vidis ne
klare. Unu ventumilo estas nenio
valora . . .”

*La aŭtoro estas oficisto 39-jara
de fabriko en Shaanxi-provinco.*



“Li vere estas ŝtelisto,” persistis la knabineto en sia akuzo, “mi vidis klare.”

“Bastardo . . .” la junulo paŝiĝis antaŭen kaj piede renversis la korbon, kaj la ventumiloj falis teren senorde.

Brilis larmoj en la okuloj de la knabino. Ŝi rigardis la surterajn ventumilojn; kiam ŝi levis la kapon, larmoj jam fluis sur ŝiaj ruĝaj vangoj.

La pasaĝeroj aliris ĉirkaŭ nin.

“Vi estas ŝtelisto!” en la okuloj de la knabineto flamiĝis indigno, kvazaŭ fulmo en malhela nokto. “Vi ŝtelis . . .” “Pa”, la knabino estis vangfrapita de la junulo kaj ŝiaj orelingoj ekskuis. “Mi batmortigos vin!” minacis la junulo. Je la vorto la du ventumiloj elrigardis el lia pantalona poŝo.

“Lasu, lasu,” mi baris la junulon, “ŝi estas nur infano.”

“Li ja estas ŝtelisto,” firme certigis la knabino singultante, “li forŝtelis vian monujon. Ĝi estas nun en lia poŝo.”

Mirigite, mi ekpalpis mian poŝon — forestis la monujo. Mi stuporiĝis. Kion fari? Kapti lin! Sed kion fari, se li havus armilon? . . . Tamen en la monujo estas monbiletoj de pli ol cent juanoj! . . . Mi hezitis. Dume la junulo insultis kaj foriris. Ĝuste tiam la knabino, vigla kiel kateo, ĵetis sin al la junulo, sagraĵe elprenis el lia poŝo mian monujon. Ŝi alte tenis la monujon en la mano kaj diris: “Jen tion ĉi li ŝtelis.”



La junulo eksplodis de kolero kaj ĵetiĝis al la knabineto. Sed la knabineto jam ĉesis plori, brave levis sian kapon kaj aplombe staris, senmove. Ĉirkaŭe staris indignaj homoj. La sceno kvazaŭ tondro min frapis. Mi subite havis kuraĝon kaj mia sango ekbolis. Mi sentime min ĵetis antaŭen: “Tio ja estas mia monujo. Kion vi volas fari?”

La ŝtelisto ektimiĝis, deprimiĝis kaj senmoviĝis. Liaj rigardoj vagadis ĉirkaŭen kun evidenta intenco forkuri.

Li ne sukcesis forkuri. Li estis forportita de policanoj.

La knabino sukcesis trovi nur kvin ventumilojn. Mi emocie levis la korbon. Subite mi sentis, ke la ventumiloj estas tre delikataj, la lotusoj estas tiel versimilaj, kvazaŭ ili estus odorantaj parfumon. Mi demandis, kiu faris la ventumilojn. Ŝi diris, ke ŝi kaj ŝia avino kune faris.


“Kiu pentris la florojn?”

“La avino.”

“Bele pentritaj . . . Kial vi estas tiel kuraĝa kaj ne timas lin?”

“Mi estas bonulo.”

“Mi estas bonulo,” ŝia firma



voĉo ŝvebis ĉe miaj oreloj kaj poste radikiĝis en mia koro.

“La avino diris, ke la bonuloj ne devas timi la malbonulojn.” Mia animo estis denove skuita kaj estis kaptita de honto kaj emocio. Larmoj moviĝis en miaj okuloj. Mi elpoŝigis monbileton de kvin juanoj kaj enmanigis al ŝi.

“Mi aĉetas ĉiujn viajn ventumilojn.”

Konsternite, ŝi rigardis la monon kaj murmuris:

“Mi . . . mi ne povas ĝin ŝanĝi.”

“Vi ne bezonas tion fari. Mi pagas la kvin juanojn kontraŭ kvin ventumiloj. Nu, decidite.”

“Ne, mi ne devas akcepti,” ŝi redonis al mi la monon.

Mi ĉiamaniere klopodis por esprimi mian dankon kaj kortuŝon, sed ŝi firme rifuzis akcepti kaj persistis en la prezo de dek cendoj.

Malgraŭ mia petado, ŝi sensanĝe insistis en sia decido. Sen alia solvo, mi donis al ŝi unu juanon kaj dek cendojn por montri, ke mi volas aĉeti ĉiujn ŝiajn ventumilojn. Ŝi prenis la monon, elektis la plej bonan ventumilon, donis ĝin al mi kaj samtempe enmanigis al mi la unu-juanan monpaperon, kaj poste facilpaŝe foriris kun la korbo.

“Mi aĉetos ĉiujn!” mi kuratingis ŝin kriante.

Levante la ruĝajn vangojn, ŝi diris al mi malkuraĝe sed prudente: “Ni kamparanoj ne kapa-

blas elfari delikatajn ventumilojn, kaj vi urbanoj certe ne ŝatas ilin.”

Ŝi foriris. Mi ne povis haltigi ŝin. Mi denove kuris al ŝi kaj demandis pri ŝia nomo kaj adreso, sed ŝi informis min nur pri sia nomo, Lotuso.

Mi, starante en nebula pluveto, rigardis ŝian malproksimiĝantan figuron. Flirtadis la plasta membrano sur ŝia korpo. Sur la kota tero lasiĝis vico da nudpedaj signoj. Rigardante en la direkton de ŝia foriro, larmoj vualis mian rigardon. La figuro fariĝis pli kaj pli malklara kaj malaperis. Antaŭ miaj okuloj kvazaŭ etendiĝis vastega lago plena de lotusfloroj. Inter la senombraj lotusfloroj mi kvazaŭ vidis la plej belan floron, unu veran homon.

(Daŭrigo de p. 11)

Ĉiam ekzistas esperantistoj, kiuj rifuzas agnoski, ke radiko havas jam karakteron gramatikan. Ekzemple, D-ro Panel (1912) skribis, konklude de longa studo:

“La radikoj havas en si memneniun karakteron gramatikan. Ili estas nek substantivoj abstraktaj aŭ konkretaj, nek adjektivoj, nek verboj transiraj aŭ ne-transiraj. Ili alportas en la vorton nur la signifon: tio estas, la ideo, kiun ni ligas kun ĉiu simbolo, kun la kerno de la vorto”. Do la signifo de *tabl* estas la sumo de ĉiuj impresoj, kiujn mense ni ligas kun abstrakta

koncepto pri tiu meblo. Ne ĉiuj tabloj tute samas unu kun la aliaj: ekzistas tabloj grandaj kaj fortikaj, etaj kaj renverseblaj, faldeblaj, tri- aŭ kvar- aŭ seskruraj, ktp, ktp, kies kuna faktoro estas ia abstrakta tableco. Krome, se dum pikniko iu roko rolas table, t.e. sur ĝin ni dismetas niajn sandviĉojn kaj trinkaĵojn, tiu roko metafore tablas, t.e. certagrade konformiĝas al la ideo de *tabl* kio estas la dirita abstrakta konceptaro. Tio estas la semantika enhavo de la radiko; ĝi ne dependas ekskluzive de ia substantiveco aŭ adjektiveco. Ĝuste pro tiu semantika malprecizeco, kiu estas tutmonda fenomeno, multaj lingvistoj eĉ aser-

tas, ke reala tradukado de vorto en unu lingvo al vorto en alia lingvo estas entute neebla, ĉar la semantika enhavo de la angla vorto *horse* ne povas esti egala al la semantika enhavo de la rusa vorto *kon'*. Sed ni lasu tiun harfendadon, kaj nur konstatu, ke la semantika enhavo de esperanta radiko eble ne enhavas kategori-econ.

(Daŭrigota)

* La aŭtoro estas prezidanto de la Akademio de Esperanto.

** Vd. ankaŭ en Ludovikito: *Senlegenda Biografio de L. L. Zamenhof*, ĉap. 11 k.a. iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, *kromkajero 1*, 1982.



PLEJ-OJ DE LA MONDO EN ĈINIO

de MEI ZHI

PRESKAŬ ĉiuj landoj, inkluzive de Ĉinio, havas siajn plej-ojn de la mondo. Mi volonte konigos kelkajn plej-ojn de la mondo en Ĉinio al tiuj, kiuj interesiĝas pri tio.

1. Ĉinio estas lando kun la plej granda loĝantaro en la mondo. Laŭ la censo farita en 1982 Ĉinio havas 1 031 882 511 loĝantojn.

2. Ĉinio estas lando kun la plej multaj altebenaĵaj lagoj en la mondo. En Ĉinio estas nemalmultaj altebenaĵaj lagoj pli ol 4 000 metrojn super la marnivelo. El ili Nam Co estas la plej alta en la mondo. Ĝi troviĝas en la sudokcidenta parto de Ĉinio kaj havas la absolutan altecon de 4 718 metroj kaj areon de 1 993 kvadrataj kilometroj.

3. La Qinghai-Tibeta Altebenaĵo en la okcidenta parto de Ĉinio estas la plej alta en la mondo. Ĝia meznombra absoluta alteco superas 4 000 metrojn.

4. Turpan, la plej malalta baseno en la mondo situas en Xinjiang en la nordokcidenta parto de Ĉinio. Ĝia plej malalta fundo estas 154 metrojn sub la marnivelo.

5. La plej vasta leŭsa altebenaĵo en la mondo troviĝas sude de la Altebenaĵo de Interna Mon-

golio en la norda parto de Ĉinio. Ĝi, 1 000—2 000 metrojn super la marnivelo, havas areon de 600 000 kvadrataj kilometroj.

6. La nombro de specoj de dolĉakvaj fiŝoj de Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo. Ĝi superas 700, inter kiuj ĉ. 50 havas ekonomian valoron.

7. Ĉinio havas pli ol 2 000 specoj de krizantemoj. La nombro okupas la unuan lokon en la mondo.

8. La Granda Muro de Ĉinio, la plej longa en la mondo, konstruita dum la 14-a—17-a j.c., komenciĝas de la pasejo Jiayuguan en la provinco Gansu en okcidento kaj finiĝas oriente ĉe la pasejo Shanhaiguan en la provinco Hebei, kun totala longeco de 6 700 km. Se oni pavimus per la brikoj kaj ŝtonoj de la Granda Muro vojon kvin metrojn larĝan kaj 0.35 metron dikan, ĝia longeco povus esti trioble pli granda ol la ekvatoro de la terglobo.

9. Ĉinio la unua ekuzis karbon, antaŭ 2 000 jaroj.

10. La ŝtona budho Majtrejo 71 metrojn alta en la gubernio Leshan, Sichuan-provinco, estas la plej granda en la mondo.

11. En la dua jarcento a. K. Ĉinio inventis paperon. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.

K.—23 p. K.) la papero farita el vegetalaj fibroj estis la plej frua en la mondo. En 105 p. K. Cai Lun kolektis la sperton de metiartistoj pri paperfarado kaj faris bonkvalitan paperon el eluzita kanabŝnuro, ĉifono kaj malnova fiŝreto. Kaj en la 3-a jarcento la tekniko de paperfarado estis enkondukita en aliajn landojn.

12. Ĉinio plej frue inventis tipografion. En la dua duono de la 6-a jarcento kaj la unua duono de la 7-a jarcento Ĉinio inventis ksilografian presarton, kiu populariĝis en libropresado en la 9-a jarcento. Bi Sheng de la Norda Song-dinastio (960—1127) inventis bakitajn argilajn pres-tipojn. En la mezo de la 8-a jarcento la tipografion eklernis aliaj landoj.

13. En Tang-dinastio (618—907) Ĉinio inventis pulvon, kiun oni grandkvante uzis en milito ekde la 10-a jarcento. Kaj en la 13-a jarcento la pulvo estis enkondukita eksterlanden.

14. Ĉinio estas lando, kiu plej frue elpensis kompason. Jam en la periodo de Militantaj Regnoj (475 a. K.—221 a. K.) oni komencis uzi nadlon poluritan el natura magnetito. Estas noto pri kompaso en verko de Han Fei, ĉina filozofo en la 3-a jarcento a. K. En la Norda Song-dinastio oni komencis apliki kompason al marnavigacio kaj en la 12-a jarcento Eŭropo ekuzis ĝin.

15. Ĉinio estas lando, kiu plej frue en la mondo komencis bredi silkraŭpojn kaj teksu silkon. Antaŭ 3 000 jaroj Ĉinio tre prosperis en tiuj aferoj.

16. Ĉinio havas la plej antikvajn observatoriojn en la mondo.

(Daŭrigota sur p. 48)

MEMORE AL LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE J. HAŠEK



J. Hašek

LA kuranta jaro estas la 100-a datreveno de la naskiĝo de Jaroslav Hašek, elstara realisma verkisto de Ĉeĥoslovakio. Li estis aŭtoro de la fama satira romano «La Bona Soldato Ŝvejk». Pasintjare la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj honoris lin per

la titolo “fama kultura persono de la mondo”.

Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de J. Hašek, la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ĉina Verkista Asocio kune okazigis memorkunvenon en Pekino, en kiu oni prezentis liajn vivon kaj

Memorkunveno okazigita de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ĉina Verkista Asocio por festi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de J. Hašek



verkojn. La Eldonejo de Fremdlanda Literaturo unuafoje eldonis la romanon «La Bona Soldato Ŝvejk» kiun oni ĉinigis rekte el la ĉeĥa lingvo.


La 30-an de aprilo 1833, J. Hašek naskiĝis en la familio de malriĉa instruisto. Tiam lia patrujo Ĉeĥoslovakio estis sub regado de Aŭstra-Hungara Imperio, la vasta popolo multe suferis de sklavigo kaj ekspluatado. Kiam li estis 13-jara, lia patro mortis. Por sin vivteni li devis labori en apoteko kiel metilernanto. En la aĝo de 15 jaroj li forlasis sian patrujon kaj vojaĝis al iuj orienteŭropaj landoj. Tie li vivis inter ciganoj, senlaboruloj, vagabondoj kaj aliaj el la malsuperaj socitavoloj. Dank’ al tio li multe riĉigis siajn sciojn kaj akumulis originalajn materialojn por sia posta verkado. En la fino de la deknaŭa jarcento li lernis en komerca lernejo kaj havis ŝancon kontakti la rusan literaturon. Li precipe ŝatis A. Puŝkin kaj M. Gorkij. Fininte la studon en la lernejo li laboris kiel komizo en iu banko. Poste li estis maldungita pro forlaso de sia laborposteno al ekskurso. En 1914 eksplodis la Unua Mondmilito, li estis rekrutita. Tamen li ne volis servi al imperiismo. Post la Oktobra Revolucio li aliĝis al la rusa revolucia armeo, kie li fervore laboris. Li redaktis kvar gazetojn en malsamaj lingvoj: «Ĉeĥa Pioniro», «Uragano», «Atako» kaj «Aŭroro». En la fino de 1920, J. Hašek revenis al Prago, ĉefurbo de sia patrujo. Ĉirkaŭ li regis kruela realo kaj maljusteco. Atakis lin suspekto, apatio, kalumnio kaj gvato, antaŭ kiuj li ne deprimiĝis, sed multe firmiĝis lia volo. Ĝuste en tia cirkonstanco li senlace batalis kontraŭ la mallumaj fortoj per sia satira plumo kaj kreis la

mondfaman verkon «La Bona Soldato Ŝvejk». Je la 3-a de januaro 1923, malriĉa Hašek forpasis pro korparalizo kaj pulmito en la aĝo de 40 jaroj.

J. Hašek estis fekunda verkisto, kiu komencis publikigi sian novelon en la aĝo de 17 jaroj. En sia mallonga vivdaŭro li sume verkis pli ol 1 200 novelojn kaj 3 romanojn, el kiuj «La Bona Soldato Ŝvejk» estas plej elstara.

La supre dirita verko pronas la Unuan Mondmiliton kiel fonon kaj priskribas malfeliĉajn travivaĵojn de ĉeĥoslovakia soldato Ŝvejk en bataloj. Per tio li profunde malkaŝis la reakciecon de imperiisma milito. Ŝvejk, la servosoldato de arma pastro kaj kapitano, estas honesta, bonkora kaj sprita kun aminda mieno. Li kuraĝas malrespekti la imperiestran majestecon kaj ofte embarasis familianojn kaj parencojn de la imperiestro, altrangulojn, generalon, policanon, juĝiston kaj pastron. La aŭtoro estis sobra realisto. Li atenteme observis la malluman realon kaj ĝin senkom-

Jiang Lu, respondeculo de la Eldonejo de Fremdlanda Literaturo, donacas la ĉinan tradukon de verkoj de J. Hašek al la ambasadoro de Ĉeĥoslovakio al Ĉinio.




pate kritikis kaj mokis. Legante liajn verkojn la suferplenaj popoloj ricevas plezuron kaj edifon pri la vivo.

J. Hašek volis verki «La Bona Soldato Ŝvejk» en kvar volumoj. Li planis, ke en la kvara volumo Ŝvejk aliĝus al la Ruĝa Armeo de Sovetunio post kiam li estis kaptita, kaj poste venus al Ĉinio sekvante ĉinan soldaton en la Ruĝa Armeo kaj partoprenus en la Liberiga Milito de la ĉina po-

polo. Bedaŭrinde, kiam li estis verkanta la kvaran volumon, lia koro ĉesis bati. Lia verko estas senmorta. La usona verkisto Edgar Snow opiniis, ke «La Bona Soldato Ŝvejk» estas same majstra kiel «La Ĉefa Historio de A-Q» verkita de Lusin. Nun «La Bona Soldato Ŝvejk» estis eldonita en pli ol 40 lingvoj inkluzive de Esp-tradukajo fare de ĉeĥo O. Knichal. Ĝi estas ŝatata de milionoj da legantoj tra la mondo.

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ŝanhajo
2. Kunming
3. Dancheng-gubernio
4. Sichuan-provinco
5. Xi'an
6. Guizhou-provinco
7. Jingdezhen

SCIENCAJ KAJ KULTURAJ ATINGOJ DE LA SUDAJ KAJ NORDAJ DINASTIOJ

de BA HONG

EN la 170 jaroj de la pereco de la Orienta Jin-dinastio en 420 p.K. ĝis la landunuigo fare de Sui-dinastio en 589 p.K., en suda kaj norda Ĉinio aperis sinsekve kelkaj dinastioj, kiuj anstataŭis unu alian. La ĉinaj historiistoj nomis ilin Sudaj kaj Nordaj Dinastioj. Tiam multe prosperis la scienco kaj kulturo de Ĉinio

ZU CHONGZHI

En tiu periodo naskiĝis la fama ĉina matematikisto kaj astronomo Zu Chongzhi (429-500 p.K.). Liaj patro kaj avo havis profundan konon pri astronomio kaj kalendaro, kio donis al li favorajn kondiĉojn de lernado. En Daming-eraco de la Sudaj Dinastioj li, 33-jarulo, kreis kompare avangardan kalendaron, tial ĝi ricevis la nomon Daming-kalendaro.

Tiu kalendaro estis kreita de Zu Chongzhi surbaze de lia longtempa observado al la astroj kaj multe pli preciza ol la malnovaj. La tropika jaro laŭ lia kalkulo havis 365.242814811 tagojn. Ĝi estas nur je 50 sekundoj malpli longa ol tiu mezurita per la moderna scienco. Li montris, ke la revoluo de la luno ĉirkaŭ la tero bezonas 27.21223 tagojn. La kalkulo estas diferenca je malpli ol unu sekundo kompare kun tiu mezurita per la moderna scienco. Laŭ la pasintaj kalendaroj 19 jaroj havis 7 supermonatojn, Zu Chongzhi faris pli

precizan kalkulon, ke 391 jaroj havas 144 supermonatojn.

Ankaŭ en matematiko Zu Chongzhi havis elstarajn atingojn. Li science elkalkulis precizan π , la plej fruan en la mondo: inter 3.1415926 kaj 3.1415927. Post pli ol mil jaroj, nederlanda kaj germana matematikistoj akiris la proksimuman takson pri π .

Nur en la nuna jarcento oni ekkonis la altan valoron de liaj sciencaj atingoj. En la kvindekaj jaroj de la kuranta jarcento li estis honorita kiel unu el la mondfamaj kulturaj personoj.

KOMENTARIOJ PRI LA "AKVOVOJA KLASIKAĴO"

La "Akvovoja Klasikaĵo" naskiĝis antaŭ la kvara jarcento kaj estis rigardata kiel la unua speciala verko pri riveroj kaj akvosistemoj de Ĉinio. En tiu simpla verko kun nur pli ol 10 000 ideografiaj legeblis la notoj pri 137 riveroj en la antikva Ĉinio, krome en ĝi troviĝas nemalmultaj eraroj. Li Daoyuan (466 aŭ 472-527 p.K.) de la Nordaj Dinastioj faris al ĝi klarigojn kaj titolis ĝin "Komentarioj pri 'Akvovoja Klasikaĵo'", en kiu legeblas notoj pri 1 252 riveroj. Li priskribis la fonton de ĉiu rivero, la de ĝi trapasatajn montojn, ebenaĵojn, urbojn, trapasejojn kaj la geografian evoluon. Li traktis en la libro ankaŭ la koncernajn historiajn eventojn, personojn, legendojn, mi-

tojn, historiajn restaĵojn kaj tomboŝtonojn. Oni povas trovi en ĝi preskaŭ ĉiujn rakontojn ĉirku-lantajn dum miloj da jaroj en nia lando. Tiu libro kun 300 000 ĉinaj ideografiaj enhavas citaĵojn el 437 verkoj. Ĝia viveca priskribo faris ĝin klasika literatura verko. Eĉ hodiaŭ ĝi restas ankoraŭ grava referenca verko pri la ĉina geografio kaj la ĉina historio.

"QI MIN YAO SHU"

"Qi Min Yao Shu" (Gravaj Artoj por Feliĉigo de la Popolo), verkita de agronomo Jia Sixie de la Nordaj Dinastioj surbaze de lia sukcesa esplorado de la ĉina agromonio antaŭ la sesa jarcento, enhavas 92 artikolojn kun pli ol 110 000 ĉinaj ideografiaj. Kiel la plej frua agromonia verko en Ĉinio, la libro kun riĉa enhavo estis verkita inter 533-544 p.K. Ĝi temas pri plugado, selektado, kulturado de grenaj plantoj, legomoj, bambuo, arboj, fruktaroj kaj melonoj, hortikulturo, bredado de brutoj, kortobirdoj kaj fiŝoj, preparado de vino, vinagro, manĝaĵoj kaj utiligo de sovaĝaj plantoj. El tio videbliĝas, ke la tiamaj kamparanoj jam posedis konsiderinde altnivelan agrikulturan teknikon.

En la libro la verkinto alte taksis la aŭtunan plugadon kaj montris, ke en la plugado oni devas fari konvenan profundon laŭ la konkretaj kondiĉoj. Li resumis ankaŭ la sperton pri rastado,



Statuo de Zu Chongzhi

sarkado kaj racia plugado por konservi grundan humidecon kaj semado en humida grundo antaŭ ĝia sekigo. Antaŭ Jia Sixie, oni lasis la kampojn alterne ripozi, por ke ili reakiru fekundecon. Krome, Jia Sixie esploris pri la alterna kulturado de agrikulturaj plantoj. Laŭ la karakterizoj de plantoj, li montris kiuj taŭgas por alterna kulturado kaj kiuj ne. Li resumis la sperton en tiu flanko kaj konkludis, ke la legumencaj plantoj taŭgas por la unuavica kulturado, kaj aprobis la efikon de la verdaj sterkoj.

En la fruktarba kaj forsta flegado li resumis la sperton en bedo-kulturado de arbidoj, gref-tado, kontraŭprujna fumizado kaj aliaj, kiu estas aplikata eĉ hodiaŭ.

POEZIO TIUPERIODA

La poezio de tiu periodo okupas gravan lokon en la ĉina literatura historio. La pejzaĝaj poemoj de la Sudaj Dinastioj kaj la popolaj kantoj de la Nordaj Dinastioj estas fame konataj.

Xie Lingyun (385-433 p.K.), kaj Xie Tiao (464-499 p.K.) de la Sudaj Dinastioj estis plej famaj poetoj. Iliaj poemoj reliefe prezentis la naturan ĉarmon. Nun

legu famajn versojn de Xie Lingyun:

*En vastejo puras sabla bordo
Alte brilas la aŭtuna luno.
Tardprintempe belas vasta
verdo*

*Rokoj altaj baras blankajn
nubojn.*

Jen kiel vivece la versoj prezentis belon de la naturo.

La popolkantoj de la Nordaj Dinastioj spegulis la vastan socialan vivon. "Ĉile-ebenajo" kaj "Mulan" ja estis majstroverkoj tiuflankaj.

*"Ĉile-ebenajo
Kuŝas ĉe Yin-monto.
La ĉielo kiel tendo
Pendas ĝis la horizonto.
Sub la ĉielblu' sen baro
La paŝtejo vastas kiel maro.
Kiam vent' klinigas herbojn,
Ekaperas bovoj kaj ŝafoj en
aroj."*

Per la mallonga versaro la poemo kondukis la legantojn al la vasta stepo de la norda Ĉinio.

La poemo "Mulan" sukcese modlis figuron de heroino. Ŝi estis knabino el ordinara familio. En milito ŝi en viraj vestoj rekrutiĝis anstataŭ sia patro. Venkintino, ŝi rifuzis altrangan oficon kaj premion kaj revenis hejmen. Nur post kiam ŝi demetis siajn militistajn kostumojn en la gepatra domo, ŝiaj kunbatalantoj trovis ŝin knabino!

LA ŜTONKAVERNAROJ DE YUNGANG KAJ LONGMEN

La skulpturo de la Norda Weidinstio brilis kiel perlo en la trezorejo de la antikva arto de Ĉinio, la ŝtonaj statuoj de la ŝtonkavernaroj de Yungang kaj Longmen atingis la kulminon de ĝia arto. Dum tiu periodo budhismo multe prosperis. Pingcheng (la nuna urbo Datong de Shanxi-provinco) estis la ĉefurbo

de la Norda Wei-dinastio kaj ankaŭ la tiama budhisma centro. La regantoj skulptigis sur rokoj budhajn statuojn kaj farigis gravuraĵojn pri budhismaj rakontoj. La ŝtonkavernaro de Yungang, longa je pli ol unu kilometro de okcidento al oriento, situas okcidente de la urbo Datong je 16 kilometroj. Tie troviĝas 53 ŝtonaj kavernoj kun pli ol 51 000 statuoj, inter kiuj la plej granda altas 17 metrojn, ĉiu ĝia piedo longas kvar metrojn. La konstruado de la kaverno daŭris preskaŭ 40 jarojn.

En 494 p.K., la imperiestro Xiaowen de la Norda Weidinstio prenis Luoyang kiel sian novan ĉefurbon, ankaŭ la ŝtonkaverna arto transiris de Pingcheng al Luoyang (en la nuna Henan-provinco). Oni do komencis konstrui kaverton en la monto Longmen sude de Luoyang. En la postaj pli ol mil jaroj la sekvaj dinastioj daŭrigis tian konstruadon. La ŝtonkavernaro de Longmen havas pli ol 2 100 kavernojn kaj niĉojn kun pli ol 100 000 statuoj. Iliaj formoj estis ankoraŭ pli diversaj ol tiuj de la ŝtonkavernaro Yungang.



Mulan antaŭ militiro
Ilustraĵo de Wu Shousong

ANTI-KVA CERAMIKO DE ĈINIO

de PAN ZHAOHONG

LA porcelano estas granda eltrovo de la antikvaj ĉinaj laboruloj.

Frue en la neolitiko antaŭ 8 000 jaroj la ĉina popolo jam faris kaj uzis fajencaĵojn. En multaj kulturaj ruinoj de Ĉinio oni elterigis diversspecajn fajencaĵojn ruĝajn, nigrajn, maldikajn kaj farbitajn. La plej tipa estas la ruino de la Yangshao-a Kulturo ĉe Banpo-vilaĝo proksime de la urbo Xi'an, Shaanxi-provinco. Tiu kulturo ekzistis en la prospera periodo de la matriarka socio antaŭ 6 000 jaroj. Tiam oni jam faris fajencaĵojn kun diversaj bildoj kaj desegnoj, plejparte de bestoj kaj vegetaloj, ekz., fiŝo, rano, cervo, homvizaĝo k.a.

Kun la antaŭenmarŝo de la historio altiĝis iom post iom la kvalito de fajencaĵoj. En la dinastioj Shang kaj Zhou (16-5a jc. a. K.) jam troviĝis profesiaj ceramikistoj kaj en la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) aperis fajencaĵoj kun delikataj desegnoj kaj bildoj de monto, rivero, floro kaj birdo. Antaŭ nelonge ĉinaj arkeologoj trovis fajencajn militistojn kaj ĉevalojn en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-207 a.K.) en Lintong, Shaanxi-provinco, kiuj montris novan nivelon de ceramiko en tiu tempo. En la produkta praktikado ceramikistoj trovis plum-boglazuron kaj per ĝi glaceigis

fajencaĵojn. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p. K.) tre populariĝis la glazura teknologio kaj aperis ceramikajoj kun pluraj koloroj. La famaj "trikoloraj fajencaĵoj de Tang-dinastio" estis glazuritaj de metiistoj de tiu dinastio per blanka, flava, blua, verda, nigre ruĝa kaj purpura farboj. La fajencaĵoj per si mem markis ankoraŭ pli novan prosperan periodon de tiu metiarto en la dinastioj Sui kaj Tang (581-907 p.K.).

La eltrovo de la porcelano iradis sian longan vojon. La plej primitiva porcelanaĵo aperis en Shang-dinastio, antaŭ 3 400-3 500 jaroj. La temperaturo por baki porcelanaĵojn estis multe pli alta ol tiu por baki fajencaĵojn, tial la kvalito de la antaŭa multe superis tiun de la lasta. La diafanaj porcelanaĵoj estis solidaj, likimunaj kaj tintsonaj.


En la malfrua periodo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) oni jam povis fari bonkvalitan bluan porcelanaĵojn en Zhejiang-provinco. Tiajn porcelanaĵojn plurfoje trovis ĉinaj arkeologoj.

La bluj porcelanaĵoj de Jin-dinastio (265-420 p. K.) estis diafanaj kaj havis stabilan glazurkoloron kaj novan stilon por ornamado. En tomboj de Jin-dinastio oni trovis porcelanajn


modelojn de besto, turo, homo, grenejo kaj poto. Ili ne nur bildigis la socian vivon, ke bienuloj bredigis multajn bovojn, ŝafojn, kokojn kaj anasojn en la kortoj kaj vivis lukse en la altaj domoj, sed ankaŭ montris la maturan nivelon en farado de bluj porcelanaĵoj. La ideografiaĵo "porcelano" aperis unuafoje en tiamaj notoj.

La dinastioj Sui kaj Tang troviĝis en la disvolviĝanta periodo de la ĉina feŭda socio. Tiam multe progresis metiarto kaj kulturo. La produktado de porcelanaĵoj eniris en novan pompan etapon. En tiu tempo oni jam preparis glazurojn miksitajn kun metaloksidaj baki diverskolorajn porcelanaĵojn. En la malfrua periodo de Tang-dinastio, la Kvin Dinastioj kaj la komenca periodo de Song-dinastio konstruiĝis la bakujoj Yue kun Shaoxing kaj Yuyao en Zhejiang-provinco kiel la centro, kiuj produktis delikatajn blujn porcelanaĵojn.

Ĉirkaŭ la deka jarcento blankaj kaj bluj porcelanaĵoj estis vendataj en Egiptio, Irako, Hindio, Japanio kaj aliaj landoj. Ankaŭ la ĉina porcelana teknologio en tiu periodo estis enkondukita en aliajn landojn kaj bone akceptata. Tiam Ĉinio havis du vojojn por eksporti porcelanaĵojn: unu estis la fama "Silka Vojo" (en Xinjiang kaj Meza Azio) en norda Ĉinio, kiu kondu-



Kolora fajencaĵo el la neolitiko



*Porcelana vazo kun bluj
desegnoj de Yuan-dinastio*

kis al Eŭropo; kaj la alia trairis la najbarajn landojn en la sudo, kiuj poste transportis la porcelanaĵojn al landoj de Nord-Afriko kaj ĉe Mediteraneo. Kaj post la 15-a jarcento ĉinaj porcelanaĵoj estis uzataj ĉie en Eŭropo.

En Song-dinastio (960-1279 p. K.) konstruiĝis bakujoj ĉie en la lando. La kvalito, koloroj, plastiko kaj kvanto de la porcelano multe superis tiujn de la antaŭa tempo. Samtempe kun tio aperis nombro da famaj porcelanaj bakujoj ĉiu kun specifa stilo. Ekzemple, Jun-bakujo produktis matenruĝan porcelanaĵon, Ru-bakujo — ĉielbluan, Guan-bakujo — dike glazuritan, Ge-bakujo — glacivejnan kaj Ding-bakujo — flore gravuritan.

La metiistoj de Song-dinastio aldonis koloron al glazuritaj porcelanaĵoj. La apliko de pentrarto

en ornamado de porcelanaĵoj levis la ĉinan porcelanan arton al tute nova etapo.

Yuan-dinastio (1271-1368 p.K.) estis grava kreiva periodo de produktado de ceramikaĵoj. La urbo Jingdezhen estis la plej bona ekzemplo en tiu flanko. Ĝi aplikis novan teknologion en produktado kaj povis fari grandajn porcelanaĵojn. Oni ankaŭ sukcesis fari porcelanaĵojn kun bluj desegnoj kaj kun ruĝa koloro sub glazuro. Inter la artaĵoj estis fajnaj produktaĵoj faritaj per pentrado, skulptado, algluado k.a., kio multe pli maturigis la kombinon de pentrarto kaj porcelana teknologio. Kaj ankaŭ la koloraj glazuraĵoj atingis grandan sukceson. Pro tio Jingdezhen fariĝis la centro de la ĉinaj porcelanaĵoj kaj estis konata kiel "porcelana urbo".

En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) la produkto de porcelanaĵoj disvolviĝis multe pli rapide ol iam ajn en la historio. La porcelanaĵoj estis delikataj, modere bakitaj kaj kolorriĉaj. Dank' al progresinta teknologio kaj socia influo la porcelana produkto disvolviĝis en la direkto al multspececo, brilkoloreco kaj ĉarmaj desegnoj de porcelanaĵoj. En Ming-dinastio oni faris porcelanaĵojn ankaŭ kun bildoj de monto, rivero, homo, floro, birdo kaj aliaj, krom elegantaj desegnoj. En la periodoj de Kangxi kaj Yongzheng de Qing-dinastio en la 17-18-aj jarcentoj la ĉina porcelana arto atingis sian kulminon. Estis tre multaj la specoj de la produktaĵoj kaj kolorglazuroj. La porcelanaĵoj de tiu periodo jam fariĝis valoraj de famaj muzeoj kaj kolektistoj de diversaj landoj.

KORTEGAJ DANCOJ KAJ MUZIKO DE TANG-DINASTIO SUR LA HODIAŬA SCENEJO

TANG-DINASTIO (618-907 p.K.) estis la plej prospera periodo de Ĉinio en ĝia antikva historio. Ĝi havis brilan kulturon, en kiu la muziko kaj dancarto prezentis sin kiel ĝian belan perlon. La muziko kaj dancoj de Tang-dinastio kun tiuj de centra Ĉinio kiel sia ĉefa konsisto asimilis tiujn de aliaj lokoj kaj nacioj kaj formis sian originalan stilon. Sed post pli ol mil jaroj perdiĝis jam granda parto de tiuflankaj materialoj, tial reaperigo de la muziko kaj dancoj de Tang-dinastio sur la hodiaŭa scenejo estas ĉiam zorgata de multaj ĉinaj artistoj kaj erudiciuloj.

Post klopodo la artistoj de la Shaanxi-a Kantodanca Teatro en Xi'an, la ĉefurbo de Tang-dinastio, kreis "Kortegajn Dancojn kaj Muzikon de Tang-dinastio" kaj sukcese faris la unuan prezentadon en la Popola Teatro de Pekino.

Malrapide leviĝis la kurteno. La sceneja dekoracio prezentis imponan palacon kaj lumiĝis kvar oraj kandelarboj. Akompanate de plaĉa muziko kortegaj artistoj gvidataj de oficisto faris prezentadon laŭvice.

La danco "Rigardo al Birdoj kaj Kaptado de Cikadoj" estas kreita laŭ fresko pri la vivo de palacaj servistinoj trovita en la tombo de iu kronprinco de Tang-dinastio. En la centro de la scenejo tri palacaj servistinoj staras senmove malantaŭ kadro de difana gaza pentraĵo. Kun leviĝo de muziko la servistinoj malrapide ekdancas kaj eliras el malantaŭ la kadro. Katenate dum longa tempo en la palaco ili sentas

grandan enuon kaj povas sin plezurigi nur per rigardo al birdoj kaj kaptado de cikadoj.

"Blankramia Danco" furoris dum centoj da jaroj antaŭ kaj post Tang-dinastio. Poetoj de diversaj dinastioj verkis multajn belajn poemojn por prikanti ĝin. La dano estis komponita de Guo Bingling. Ŝi legis multajn antikvajn poemojn pri la danco, konsultis koncernajn historiajn materialojn kune kun fakulo pri la

Skizoj de Zhao Shiyong



historio de la danco, iris al Jiangsu, la hejmloko de la “Blankramia Danco”, por lerni popolajn dancojn kaj manikosvingadon de lokaj operoj. Post peniga laborado ŝi fine prezentis la dancon antaŭ la rigardantojn: Kvin sveltaj dancistinoj en arĝente blankaj gazaj vestoj kun longaj manikoj staras sur teraso en profundeco de la scenejo. En akompano de muziko ili malrapide ekmovas siajn membrojn kaj la longaj manikoj svingiĝas kvazaŭ flugantaj blankaj kolomboj aŭ flirtantaj neĝflokaj.

La rigardantojn profunde impresis la danco “Maskitaj Militistoj” kreita laŭ militistaj figuroj trovitaj en tomboj de Tang-dinastio. Ĝin akompanas muziko de perkutinstrumentoj, kiuj estigas klarajn taktojn kaj varman etoson. La dancmovoj karakteriziĝas per forteco, simpleco kaj antikveco.

Perkutinstrumentaj muzikajoj “Kverelo de Anasoj” kaj “Dentogrincado de Tigro” estis bone akceptataj pro siaj klaraj figuroj kaj populareco. La “Kverelo de Anasoj” el tamburmuziko de



La danco “Rigardo al Birdoj kaj Kaptado de Cikadoj”

Xi’an esprimas gajan petoladon de amindaj anasoj. La “Dentogrincado de Tigro” el popola perkutinstrumenta muziko priskribas majestajn movojn de tigo dum ĝia malsupreniro de monto.

La ludo de tiuj du perkutinstrumentaj muzikajoj estas tre malfacila, ĉar la formiĝo kaj disvolviĝo de la muzikaj figuroj prezentiĝas nur per delikataj ŝanĝoj de taktoj, tembro, forteco kaj rapideco.

La kantoj en la “Kortegaj Dancoj kaj Muziko de Tang-dinastio” estas komponitaj grandparte laŭ famaj poemoj de Tang-dinastio, kiel ekzemple, “Melodio Kingping” de Li Bai, “Pluvo en Printempa Nokto” de Du Fu, “Melodio Liuĝi” de He Zhizhang k.a. Tiuj geniaj poemoj refoje kaptis la koron de la rigardantoj per la kantado post arta traktado akompanata de belaj melodioj.

“Melodio Ĝuĝi” estis verkita de poeto Liu Yuxi de Tang-dinastio en formo de popolaj kantoj. La kantisto en gaza vesto kun longaj manikoj prezentis per sia trista voĉo belan bildon de verdaj salikoj kaj kvietaj riverakvo



kaj kantis sopiron de naiva knabino al feliĉo kaj ŝian fortan malĝojon pro la disreviĝo.

Tuj post la finiĝo de la prezentado iu mezaĝa virino iris sur la scenejon kaj manpremis akto-rojn, dirante kun granda emocio: “Ja rava prezentado! Vi reapertis la brilan arton de Tang-dinastio sur la hodiaŭa scenejo. Mi estas instruistino pri historio. Kiel bone estus, se ĉiuj miaj lernantoj rigardus vian prezentadon.” Iu maljunulo diris al la komponisto: “La muziko multe ĝuigis min. Mi studas pri la historio. Tang-dinastio restigis al ni neniun muziksonon, ja estas malfacile por vi krei tiajn muzikaĵojn.”

“Kortegaj Dancoj kaj Muziko de Tang-dinastio” estas ne nur rekreaĵo de arto sed ankaŭ esploro en akademio. Iliaj komponistoj konsultis multajn historiajn materialojn, vizitis historiajn restadejojn en Shaanxi, la ŝtonkavernarojn Yungang kaj Dunhuang, kolektis popolajn tambur-muzikaĵojn kaj konsultis


famajn specialistojn kaj erudi-ciulojn pri muziko, dancarto, literaturo, historio, antikvaj objektoj, arkeologio k.a. por ke ĉiuj programeroj baziĝu sur historiaj materialoj.

Su Wen, la ĝenerala projektanto kaj reĝisoro de la prezentado, diris al mi, ke foje ŝi vidis la pentraĵon “Imperiestra Kromedzino Yang el Banujo” kaj estis tuj ravita de ŝia bela korpo en gaza robo senfortigita pro bano, kaj venis al ŝi ideo surscenigi tiun belulinon de Tang-dinastio. Ŝi uzis duonjaron por kolekti koncernajn materialojn. Sed post tio, ŝi opiniis, ke baletto kun la vivo de la imperiestra kromedzino Yang kiel la ĉefa enhavo ne povas plene speguli la brilan muzikon kaj dancarton de Tang-dinastio, ŝi do sin turnis al kreado de “Kortegaj Dancoj kaj Muziko de Tang-dinastio.”

La naskiĝo de tiuj programeroj ne estis glata. Iuj opiniis, ke estas malfacile troveblaj la koncernaj historiaj materialoj pro forpaso

de longa tempo, kaj krome historiistoj havas malsamajn imagojn pri la muziko kaj dancoj de Tang-dinastio. Sed Su Wen firme kredis, ke la muziko kaj dancoj de Tang-dinastio certe havis sian propran prezentformon, se ili vekis siatempe atenton de la mondo. Post konsulto de granda kvanto da materialoj kaj al koncernaj fakuloj, ŝi fine sukcesis en tio.

Su Wen emocie diris al mi: “Dum la pasintaj 30 jaroj de mia artista vivo mi esploris nian nacian arton kaj elkulturis tiun belan floron. Estonte mi daŭrigos mian karieron sur la vojo de la arta naciigo.”



(Daŭrigo de p. 39)

La ruino de la antikva observatorio en Luoyang, Henan-provinco, havas historion de pli ol 1 000 jaroj. La observatorio en Dengfeng-gubernio de la sama provinco estis konstruita antaŭ pli ol 700 jaroj kaj bone konserviĝis. La observatorio en Pekino lastatempe riparita havas historion de 540 jaroj. En ĝi estas ok grandaj latunaj astronomiaj instrumentoj raraj en la mondo.

17. “Si Ku Quan Shu” kun plej granda kolekto de verkoj estas enhavoriĉa kaj kompleta

libraro klasifikita en kvar kategoriojn. Ĝi, kompilata en 1772-1782, en Qing-dinastio, havas 312 000 volumojn kun 997 000 000 ĉinaj ideografiaĵoj.

18. La plej frua kaj plej granda vortaro en la mondo estas la “Vortaro Kangxi”, eldonita en 1716, en Qing-dinastio. La vortaro eksplikas 47 035 vortojn.

19. La plej granda aerolito en la mondo estas la aerolito n-ro 1 de Jilin-provinco, Ĉinio, kiu falis en la antaŭurbon de Jilin en nordorienta Ĉinio la 8-an de marto 1976. Ĝi pezas 1 770 kilo-


gramojn, multe pli granda ol tiu konservata en Usono kaj iam rigardata kiel la plej granda en la mondo.

20. Yuan Jing, la unua pando generita per artefarita fekundigo, naskiĝis en Ĉinio, ĝi havis nur 125 gramojn en la 8-a de septembro 1978, kiam ĝi naskiĝis. Post tri monatoj ĝi povis stari kaj iri. Post kvar monatoj ĝiaj haroj farigis dukoloraj kiel la maturaj pandoj. Fine de aprilo 1979 Yuan Jing komencis akcepti vizitantojn en la Pekina Zoologia Ĝardeno.

KORTEGAJ DANCOJ KAJ MUZIKO DE TANG-DINASTIO

Fotoj de CAI HAIFENG kaj DI XIANGHUA

(Bv. legi la artikolon "Kortegaj dancoj kaj muziko de Tang-dinastio sur la hodiaŭa scenejo" en tiu ĉi numero.)



Ludo de muzikiloj de Tang-dinastio




Danco de Maskitaj Militistoj



Danco de Lumigado de Lanternoj

Kortega Danco



Spada Danco





Ludo de antikva muziko






Blank-ramia, Danco






①
Karmezine glazurita porcelana botelo (1723-1735)



Kolora ceramikaĵo
(de neolitiko)




Brune glazurita porcelana kruĉo
kun oraj desegnoj (1522-1566)

ANTIKA CERAMIKO DE ĈINIO

(V. legi la artikolon "Antikva Ceramiko de Ĉinio" en tiu ĉi numero.)



Infanforma porcelana kapkuseno



Glazurita porcelana steleo (1271-1368)

